

esperantoUSA

The ELNA

Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

1991(1)

Making News This Issue

Cuba

A Canadian Esperantist takes a look at last year's World Esperanto Congress in Havana and praises it ... but not without a few criticisms of the government of Cuba.

See Page 5

Technical Terms

After a year's absence, Doug Portmann returns with more words of advice on how to select technical terms in Esperanto.

See Page 7

Meltdown in the Melting Pot

Hungarian author, translator and editor István Ertl presents us with his thoughts about America and the U.S. Esperanto movement after his month and a half trip that took him from New York to Michigan to California to Arizona.

See Page 8

In This Issue:

Trickle-down vs. Grass-roots 2

Greetings from the new C.O. Director 5

A Calendar of Esperanto Events for a New Year 9

And Much, Much More to
Delight and Inform You!

Esperanto en la Universitato

Internaciaj Universitataj Studoj pri Interlingvistiko Komenciĝis...

...ĉe la Eötvös Universitato en Budapeŝto, kies Esperanto-fako daŭre jam ekde 25 jaroj instruas esperantologion al tagaj kaj enlandaj korespondaj gestudentoj. Por la antaŭe anoncita 3-jara internacia koresponda kurso estis granda interesiĝo el la tuta mondo. Fine kun 14 aliĝantoj startis la unua sesio en septembro. Partoprenantoj venis unuavice el la proksimaj landoj kiel Aŭstrio, Svisio, Germanio, Nederlando, Francio, Hispanio kaj Bulgario. Sed aliĝis du kuraĝuloj el Usono (Karlo kaj Betti Donoghue de ELNA) kaj unu el Japanio.

Dum 5 tagoj ili partoprenis koncizajn prelegojn pri esperantologio, esperanta literaturo, esperanta kulturo, fonetiko, kaj lingvoperfektigajn okupojn. Instruis d-ro Blazio Wacha, Imre Szabó, István Ertl, Stefan MacGill, d-ro Gábor Olasz kaj d-ino Ilona

Koutny. Poste ili hejme laboros laŭ la disdonita materialo, bibliografio kaj pretigos siajn eseojn. Dum la sekva sesio en februaro la prelegojn antaŭe konsultoj kaj ekzamenoj pri la studobjektoj de la unua semestro. En la tria studjaro ili specialiĝos kaj fine post ekzamenoj kaj verkado de diplomlaboraĵo ricevos magistran diplomon de la Universitato.

La kurso estis eksterordinara ankaŭ en tiu senco, ke pluraj el la partoprenantoj (H. Mayer, F. Simonnet, D. Weidmann) prave povus aperi inter la instruistoj. Tio certigas la altan nivelon de la kursoj kaj la scian esploron de Esperanto. Ekz. vidiĝis la manko de lingvistika terminaro en Esperanto kaj la partoprenantoj decidis konscie labori pri ĝi. Vi certe renkontiĝos kun la verkotaj eseoj sur paĝoj de Esperantaj revuoj.

Our goal for 1991 1150


ELNA membership 1990 1031

ELNA membership 1989 931

ELNA membership 1988 778

ELNA membership 1987 572

Membership 890 on
February 9!



EDITORIAL

DE LA SUPRO ... DE LA SUBO

Kelkaj lastatempaj aferoj konjunkturis en mia menso por konduki min al la dialektika lukto en la Esperanto-movado inter la desupristoj kaj la desubistoj: letero tiutema de Roland Schnell en *Monato* ... la devo preparoli la historion de Esperanto antaŭ kelkaj novaj studentoj ĉe la Universitato de Kalifornio (Berklio) ... mia lastnumera recenzo de kvin teknikaj terminaroj ... komento de Grover Allred pri la mito de la dia deveno de Esperanto en la sama numero ... kaj komento de Richard Earnhart, en la sama numero, pri la bezono de studentoj lerni multajn novajn kemiajn terminojn.

Por tiuj, kiuj ne scias, kio estas "desupristoj" kaj kio—"desubistoj", mi klarigu la diferencon. La "desupristoj" turnas sian konfidon al la homoj ĉe la supro—la ŝtatestroj, la internaciaj organizoj, ktp. Oni supozas, kaj eble ne senkiale, ke se oni povos konvinki tiajn personojn subteni Esperanton, la lingvo sufiĉe baldaŭ enradikiĝos kiel la oficiala tutmonda internacia lingvo. Tio verŝajne rilatas kun la t.n. "tragutada" (angle "trickle-down") teorio de ekonomiko, laŭ kiu, kiel ĝin formuligis J. K. Galbraith, "se oni sufiĉe bone nutras la ĉevalojn, ĉiam la paseroj trovos ion por manĝi sur la vojo".

"Desubistoj", aliflanke, opinias, ke pli firman fundamenton oni konstruas rekte celante la paserojn; ili preferas dediĉi siajn rimedojn al ordinaraj homoj.

La sinteno de la desupristoj estas simpatia. Logike, oni povas supozi, ke estus multe pli facile konvinki unusolan George Bush subteni Esperanton, ol instrui la lingvon al 250 000 000 el liaj samlandanoj. Simile, se UNO akceptus Esperanton kiel oficialan, tio estus grandega antaŭenpaŝo por la lingvo.

Aliflanke, oni devas levi du gravajn demandojn rilate tiun sintenon. Ili estas: (1) Ĉu oni realece povas atendi, ke tiuj ŝlosilaj personoj aŭ organizoj fakte akceptos Esperanton? kaj (2) Kiuj, fakte, estas la klientaro, al kiu Zamenhof destinis la lingvon—la suprujoj celataj de la desupristoj, aŭ la ordinaruloj kiel vi kaj mi?

(1) Historie, malmultaj "gravuloj" kaj internaciaj organizoj, en la pasinta

jarcento, estas pretaj akcepti Esperanton kiel solvon de la mondlingva problemo—eble ĉar ĝuste tiaj gravuloj kaj organizoj ne tiel forte sentas la problemon. Instruaj estas la spertoj de Esperanto rilate la konatan rezolucion pri la instruado de Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj antaŭ preskaŭ 70 jaroj, ĉe la Ĝenerala Konferenco de UNESCO en Montevideo en 1954, kaj rilate la duan amasan petskribon al UNO antaŭ 20 jaroj. En ĉiu kazo la koncerna organizo, ofte pro premo fare de kelkaj influhavaj registaroj, rifuzis, repuŝis kaj rebatis Esperanton; sole ĉe Montevideo oni finfine akceptis favoran (sed ne tre entuziasme tian) rezolucion, kaj nur post amasa interveno fare de la urugvaja gazetaro rilate la tute nekutiman mistraktadon de la rezolucio fare de la regantoj de UNESCO.

Tiurilate, oni devas memori, ke tiuj internaciaj organizoj ne estas demokrate elektitaj institucioj, sed forumoj por registaroj. Kaj tiuj registaroj—ne unuopaj homoj—regas ilian konduton. Tiel, en UNO, el proks. 160 ŝtatempro, kelkaj kvin posedas la efektivan decidkapablon (la kvin konstantaj anoj de la Sekureca Konsilio). Kaj la instrukcioj por la reprezentantoj de ĉiuj nacioj venas de la koncernaj registaroj, ne de la homoj, kiujn ili pretendas reprezenti.

(Mi bone memoras belan karikaturaĵon postmilitan de Bill Mauldin. Du oficialuloj, deirante de iu grekforma landodomo, diskutas ion pri la internacia organizo. "Telegramu al tiu idioto ĉe UNO," unu diras al la alia, "kaj demandu, ĉu li laboras por ni, ĉu por la tuta damninda mondo!")

Subteno de Esperanto verŝajne ne estas la celo de almenaŭ du el la kvin konstantaj anoj de la Sekureca Konsilio; kaj tiuj certe havas amasan influon ĉe la aliaj ŝtatempro de UNO, kion pruvas la nuna "Dezerta Sturmo".

En la lasta jardeko UEA entreprenis plurajn novaĵojn, inter kiuj estis la UEA novjorka oficejo por pli bone rilati kun UNO kaj la kampanjo finfine penetri en Afrikon. La unua estis desuprista, la dua—desubista. Kiu, laŭ vi, ĝis nun

spertis la plej grandan sukceson?

(2) Ŝtatestroj kaj internaciaj gravuloj, post jaroj da universitata klerigo, ofte scipovas kelkajn lingvojn, aŭ ili povas (per imposte kolektita mono) dungi interpretistojn, kaj ili ĝenerale ne havas problemojn pri komunikado internacia. Jam en la tempo de Zamenhof ekzistis tiaj homoj; sed oni ĝenerale ne renkontis ilin sur la stratoj kaj en la bazaroj de Bialistoko kaj Varsovio, kie Zamenhof sorbis la inspirigon pri la bezono por internacia lingvo. Oni povas supozi, ke kiam Zamenhof skizis por si Esperanton, li ne pripensis problemon de komunikado inter la Imperiestroj de Germanio kaj Rusio (kiuj cetere ambaŭ povis paroli france), sed tiun de judaj urbanoj kaj polaj kamparanoj, ekzemple. Nome: Esperanto celis ne la malgrandan kaj nebezontan supron sed la grandegan kaj bezontan subon.

Tiu celado al ordinaraj homoj povas havi grandajn kaj neatenditajn rezultojn. Mi memoras, ke en 1970 mi aŭskultis paroladon, en flua Esperanto, fare de la tiama Prezidanto de Aŭstrio Franz Jonas ĉe la tiujara Universala Kongreso. La Prezidanto de Aŭstrio? Ĉu do oni sukcesis konvinki gravan ŝtatestron en 1970 pri la utileco de Esperanto? Tute ne. Oni sukcesis, kvardek jarojn pli frue, konvinki malgravan junan aŭstrian laboriston pri tio. Ke tiu malgrava laboristo poste fariĝis landestro, tio iusence pruvis la trafecon ne de la desupristoj en 1970 sed de la desubismo en 1930. Similajn fenomenojn oni povas trovi ĝuste en tiuj regionoj, kie Esperanto en lastaj jardekoj havas la plej grandan sukceson: en Orienta Eŭropo kaj en Ĉinio. Similajn fenomenojn oni povas atendi en la 21a jarcento ĝuste en tiuj landoj, kie Esperanto nun sukcesas en studentaj medioj—en Koreio, Irano, Ĉinio, (esper)eble aliloke.

Kaj tiu konstato kondukas min al alia demando—tiu pri neologismoj, literatura lingvaĵo, teknika terminologio, kaj kiel la neologisma dialektiko rilatas kun tiu de la desupristoj kaj la desubismo. Sed, ho ve! mi jam plenigis mian paĝon. Eble en posta numero...

Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto In the Media

Sometime in November, on the Nickelodeon network, a satire on "Sneak Previews" called "On the Television" was presented. One movie that was "reviewed" was one in which two buxom blondes were fighting Rambo-style somewhere in the Orient. Unable to speak English with two Korean soldiers, they decided to try communicating with the soldiers by using a big piece of paper and markers, *a la* "Win, Lose, or Draw." Upon making friends with the soldiers, one of the ladies stated: "Win, Lose, or Draw" is an international language, like Esperanto." The "reviewers" thought this line so important that they mentioned it again. (noted by Mark Armantrout)

Mary Meehan, staff writer for the Orlando, FL, *Sentinel* (Dec. 27, 1990), in an article titled "Language advocate urges kids to go global," describes ELNA member Hy Meltz's instruction of Esperanto to gifted fifth-graders at Bear Lake Elementary School in Forest City. The article describes Esperanto and quotes positive statements by several of the students. The article was published for a second time on New Year's Day. (sent by Cathy Schulze and Elaine Rankin)

Esperanto's usefulness as a means of reaching out and learning directly about life in other countries is the subject of a long article "Esperantists correspond with foreign pen pals," in the Harlingen, TX, *Valley Morning Star* (Dec. 30, 1990). The article details the experiences of Esperantists Bill Clay, Evaristo Garcia, Prenda Cook, Bill Goldsmith, June Allen, Faye Hoelker, Louis Tutt and Armin Doneis. (from Prenda Cook)

Bad news! "Few people are listening to language of peace, harmony," the Columbus, OH, *Dispatch* (Jan. 2, 1991) reports from the 1990 annual Modern Languages Association conclave in Chicago. For more about this accurate, objective, hard-hitting and absolutely unbiased ar-

ticle, which appeared in many U.S. newspapers, see last issue's editorial. (sent by John Massey, Elaine Rankin (*USA Today*), and many others)

Inspired by the above-mentioned article, the Chicago, IL, *Tribune* (Jan. 7, 1991) published an editorial "Dangerous mischief in academe" in which it excoriated the Modern Languages Association for its members' "narrowly focused, ideologically determined faddism." The editorial devotes some special emphasis to Esperanto, described as a "putative international language," four of whose devotees "delivered papers to one another...in a lamentably apt display of overweening self-involvement." (sent by R. Kent Jones)

A reply to the above-mentioned MLA article and Chicago *Tribune* editorial by ELNA member R. Kent Jones appeared in the Chicago, IL, *Tribune* (Jan. 15, 1991). The author mentioned several Chicago-area public figures who have supported Esperanto in recent years and invited the paper to send a reporter to the UK in Bergen to see how Esperanto really works. (sent by R. Kent Jones)

Pamela Frucci of Grosse Ile, MI, in a letter to The Detroit, MI, *News* (Jan. 18, 1991), supports Esperanto. She says: "I've given my French and English classes at Allen Park High School a taste of Esperanto. Maybe some day without articles like the one in the Detroit News, which made Esperanto sound like a lost cause (see item above), this dream of a universal language will no longer fall on deaf ears." (sent by Robert Rochte)

"'Universal language' is designed to bridge communication gap" by Laurie Marra, in the Heritage, MI, *News-Herald* (Jan. 20, 1991) is based on a visit by ELNA Board Member Sherry Wells to Pamela Frucci's English classes at Allen

Park, MI, High School. The article discusses Esperanto's history, grammar, and current activities associated with the language. (sent by Sherry Wells)

Esperanto in Troy, MI is the topic of an interview by Rebecca Powers with Sherry Wells in "Esperanto is spoken here" in the Detroit, MI, *News* (Jan. 24, 1991). In the wide-ranging article Wells discusses the current status of both Esperanto and English, the Esperanto group in Troy, *Pasporta Servo* and Esperanto pen-pals. (sent by Sherry Wells)

"One language that says it all" by Bill Driskell in the Macomb, MI, *Daily* (Jan. 26, 1991) talks about Wesley Arnold and why he is teaching Esperanto as part of the weekly Adult Enrichment series at the Butcher Community Education Center. (sent by Sherry Wells)

Benteler Exchange, the house paper of Benteler Industries of Grand Rapids, MI (Jan. 1991), devotes most of a page to the Esperanto activities of John Starling, Engineering Development Senior Technician at Benteler's Kalamazoo plant. The article quotes Starling's description of the development of Esperanto and mentions some of his activities, such as presiding over an Esperanto-language wedding and obtaining a contract to translate two of Walter Jon Williams' science-fiction novels into Esperanto. (sent by John Starling)

An article "Altar Esperanto" in *30 Days* (Jan. 1991) discusses the long-term attempts by Catholic Esperantists to obtain permission for Esperanto to be used for Masses and Sacraments. The article lists several important Catholic supporters of Esperanto, and also discusses some Italian politicians who favor the use of Esperanto. (sent by James G. Davis, Richard Mullins, and Mubarak Anwar Amar)



REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

CALIFORNIA

La 13an de januaro okazis la ĉiujara Zamenhofa Bankedo de la Golfregionaj esperantistoj. Entute 53 personoj aperis por manĝi ĉe la Cafe de Bordeaux en la urbo Oakland. Postmanĝa aŭkcio rikoltis preskaŭ \$200 por la SFŜU Stipendia Fonduso.

FLORIDA

Aranĝante kvar-lecionan aprilan Esperanto-kurson ĉe la nova "Learning Institute for Elders" ĉe la Universitato de Centra Florido, esperantisto Hy Meltz trafis rifon. Oni atendis eventualan aliĝon de 50

personoj, sed jam antaŭ la fino de januaro aliĝis entute 126 homoj. Povas esti, ke devos esti pluraj kursoj! (raportis Hy Meltz)

TEXAS

La 4an de februaro Roan Orloff Stone prelegis pri Esperanto al la ĉiusemajna lunĉkunveno de la Optimisto-Klubo en Jefferson. Ilia celo estas havigi kason por helpi al gejunuloj daŭrigi la edukadon kaj instigi al gejunuloj resti en la universitato ĝis la fino de la studoj. Oni ricevis la informon pri Esperanto kun intereso, precipe kiam s-ino Stone klarigis al ili kial

la angla lingvo ne estas la internacia lingvo; tio verŝajne trafis ilin ŝokige. Je la propono de s-ino Stone, la grupo akceptis donaci Esperanto-libron al la publika biblioteko. (raportis Roan Orloff Stone)

VIRGINIA

Proksimume dudek homoj partoprenis la regionan Zamenhofan Bankedon de la societoj de Norda Karolino kaj Virginio kaj la Esperanto-Societo de Vaŝingtono en Riĉmondo, la 15an de Decembro. Oni ludis lernigajn Esperantajn ludojn, bonege manĝis, kaj aŭskultis elstaran prelegon de d-ro Thomas Goldman. (el *La Stel-Bulteno*)

ELLA GIBSON'S SECRET WISH

by Cathy Schulze

[*Editor's note: The late Ella Gibson was elected ELNA's newest Honorary Member at the annual ELNA Convention in Mexico City in July, 1990.*]

"Ever since I was eight I have dreamed of doing something important to help others and I feel that donating this house to help further the promotion of Esperanto as an international means of communication between peoples is the most practical way I can fulfill that dream."

It was the money realized, following her recent death, from the sale of Ella's home that made it possible for ELNA to expand its services, and it is this expansion which has enabled us to increase membership dramatically. We owe much to this practical dreamer.

Ella and her husband James were my Esperanto students in 1960-62. Ella soon began using her talents for writing for

children to produce stories and playlets for the many Esperanto classes which flourished in San Mateo schools in the sixties. Lothrop, Lee & Shepard had already published her juvenile book *Martha's Secret Wish*.

Her playlet "Bonvolu Esti Mia Amiko" was presented successfully at Lawrence School in San Mateo with the principal, Dr. Edwin Feldman, playing the Uncle from UNESCO. The children involved in a birthday party were taught some simple Esperanto, most important of all the phrase "Bonvolu esti mia amiko." The plot has all the necessary tension and happy ending. That little book is still in print. "Najla Buljono" and "Tri Ursoj" (with a clever Esperanto twist) were equally popular with elementary schoolers.

On an adult level Ella's poetry appeared in the very good literary review *Norda Prismo*. Some of it will appear in the Literary Supplement to *Esperanto U.S.A.* later this year.

"The Boy Who Wanted to Unite the

World" is a fictionalized biography of Zamenhof as a boy to which Ella devoted her last years. The major events of his younger years were factual, with day-to-day adventures imagined. She did a prodigious amount of research on Jewish family life in Poland at that time, the living with the terror of frequent pogroms. Targeted for juveniles, its authenticity makes it good reading also for adults. It was written to fill a need—youngsters seeking information about Esperanto at libraries were finding only dry encyclopedia references. The book not only provides entertainment but it informs about world language problems. Its publication by ELNA is now under consideration.

With her husband, Ella taught Esperanto classes in Palo Alto and San Jose. Her interesting letters to editors were always published. She had something to say, and she said it well.

Those of us who knew this gentle, talented lady are pleased to share this remembrance with you.

EL LA CENTRA OFICEJO

Saluton!

Saluton! Mia nomo estas Mike Donohoo kaj mi estas la nova Direktoro de la Centra Oficejo de ELNA. Post kvar jaroj de elstara laboro, Mark Stephens ekŝiĝis kiel Direktoro. ELNA ŝuldas multon al li, ĉar dum tiuj kvar jaroj ELNA fine havis pli ol 1000 membrojn, kaj la servoj, kiujn la CO ofertas, pliboniĝis.

Estas malfacile sekvi tiel laboreman kaj ideoplenan homon kiel Mark, sed mi esperas, ke, kun la helpo de Ionel Onet, la Vicdirektoro, la servoj de la Centra Oficejo ankoraŭ estos altkvalitaj.

Ĉar mi mem estas novulo en la Centra Oficejo, tio pensigis min pri la novuloj kaj komencantoj en ELNA. Se vi estas novulo, eble vi ne scias, kion la CO faras. La CO havas du gravajn funkciojn: esti informcentro por homoj, kiuj petas informon pri Esperanto; oferti diversajn servojn al la membraro de ELNA. Mi deziras nur mencii unu el tiuj servoj, la materialojn por komencantoj kaj progresantoj.

Dum la administrado de Mark, la Centra Oficejo donis pli da atento al la bezonoj de la novaj membroj de ELNA. Ekzemple, li verkis Gvidlibron por ili,

kaj ni havas novan kvar-nivelan korespondan kurson. Kaj la libroservo (kiu cetere pliboniĝis pro la laboro de Ionel Onet, ties prizorganto), havas multajn novajn librojn por komencantoj.

Se vi opinias, ke vi ne parolas aŭ legas Esperanton tiel bone kiel vi deziras, vi povas plibonigi vian scipovon per la lernolibroj kaj korespondaj kursoj kiujn ELNA ofertas. La koresponda kurso estas aparte bonega ilo por la lernado de Esperanto. La instruisto korektas ne nur la skribitajn ekzercojn, sed ankaŭ la prononcadon de la lernanto, ĉar tiu devas laŭtlege dialogojn kaj ekzercojn en magnetofonon.

Kaj ne forgesu pri la Esperanto-kursoj de San-Franciska Ŝtatuniversitato, kiuj okazas ĉiun someron. Multaj esperantistoj lernis aŭ plibonigis sian Esperanton en tiuj mondfamaj kursoj.

Estas alia maniero plibonigi vian Esperanton. Se via urbo aŭ regiono havas Esperanto-klubon, kial ne fariĝi membro? ELNA trovis, ke membroj de Esperanto-kluboj konsideras sin pli bonaj parolantoj de Esperanto ol ne-membroj. Iuj kluboj ofertas kursojn en Esperanto, kaj multaj interŝanĝas novaĵleterojn kun aliaj kluboj. Tiuj

aferoj, kaj la regulaj kunvenoj de la kluboj, ankaŭ donos al vi la veran senton, ke vi estas membro de la Esperanto-komunumo. La nombro de Esperantaj kluboj kreskis dum la pasintaj jaroj; vi verŝajne trovos klubon en via urbo aŭ regiono. (Se ne ekzistas klubo en via urbo, kial ne fondi klubon?)

En 1991 ELNA enkondukos ion alian por komencantoj kaj novuloj, serion de libretoj en la angla pri Esperantaj temoj—gramatiko, historio, literaturo, ktp. La libretoj sendube helpos ilin lerni pli pri Esperanto kaj la Esperantomovado. Ni donos al vi pli da informo pri la libretoj kiam la unua estos preta.

Do, se 1991 estos via unua jaro kiel membro de ELNA, vi trovos, ke ĝi havas multon por vi. Se vi uzos la servojn de ELNA kaj via loka klubo, post nelonge vi bonege parolos Esperanton kaj estos spertulo pri la Movado!

Fine, mi esperas, ke 1991 estos sukcesplena jaro por vi kaj via familio. Se vi estas nova membro de ELNA, bonvenon kaj dankon pro via membriĝo. Se vi estas realiĝinta membro, mi dankas vin pro via daŭra fido kaj subteno al ELNA.

Mike Donohoo
Direktoro, Centra Oficejo

BELA KONGRESO—TERURA LANDO

de Stevens T. Norvell, Jr.

[*Stevens Norvell estas kanada esperantisto de Nova Skotio. Li jam plurfoje partoprenis la somerkursarojn ĉe San Francisco Ŝtata Universitato, kaj pasintjare li vizitis la Universalan Kongreson en Kubo. Laŭ lia sperto, tio estis granda plezuro—kun kelkaj gravaj makuloj. La jena artikolo unue aperis en la Halifaksregiona bulteno Inter Ni.*]

La 75a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Havano de la 14a ĝis la 21a de julio ĉi-jare. Ĉeestis pli ol 1700 esperantistoj de 54 landoj. Estis 24 kanadanoj, inkluzive tri novaskotianojn (krom mi, Connie Clark kaj Kim Keeble).

La ĉefa afero por mi estis la ĝojiga eltrovo, ke Esperanto vere funkcias kiel komunikilo inter diverslingvaj homoj;

mi povis kompreni paroladojn kaj prelegojn kaj interparoli senĝene kun gesamideanoj de Finnlando, Germanio, Pollando, Svedio, Koreio, Kubo, Sovetio, Brazilo, Italio, Nederlando, Jugoslavio, Aŭstrio, Belgio, Svislando. Eble vi diras, "Kompreneble, kion vi atendis de internacia lingvo?" Sed mi estas denaska dubanto, kaj mi devis mem sperti la provon antaŭ ol vere kredi.

La solena inaŭguro komence de la unua tago estis impona afero. La granda teatro estis plena de esperantistoj, kaj la estraro kaj eminentuloj plenigis la estradon. Estis multe da bonvenoj, paroladoj kaj konatigoj. Estis nur unu nigra makulo: la Maksimumo mem estis tie, kaj mi ne ŝatas aplaŭdon por diktatoro. Li ne parolis, sed unu el liaj ministroj faris longan, tedan paroladon hispanlingve laŭdante Esperanton, dum iu Esperanten tradukis; mallonga parolado en Esperanto estus pli taŭga kaj konvinka, miaopinie.

Mi ĉeestis naŭ prelegojn de la Internacia Kongresa Universitato kaj kunvenojn de fakgrupoj pri medicino kaj scienco. Mi ankaŭ ĝuis publikan kunvenon kun kelkaj akademianoj. Aliaj kunvenoj kiujn mi ĉeestis estis pri UEA kaj scienca aplikado, la delegita reto de UEA, kaj la kongresa temo: "Esperanto, evoluo, kultura diverseco". Mi ankaŭ povis renkonti kaj interparoli kun Prezidanto Wells kaj Prezidinto Tonkin kaj aliaj gravaj funkciuloj ĉe kunveno de la Societo Zamenhof, de kiu mi estas membro. Oni ne povis ĉion fari, ĉar ofte okazis sep samtempaj sesioj plus la elmontroj de la libroservo ktp.

Ankaŭ estis Esperanta teatra vespero kaj aliaj kulturaj festoj, kiujn mi ne ĉeestis pro laceco kaj pro la varmego, sed

eble tio estis mia eraro. Ankaŭ estis bankedo lunde kaj mi interkonatiĝis kun, inter aliaj, du junaj kubanoj. Merkredo estis por ekskursoj kaj ankaŭ mi partoprenis en unu vespera ekskurso por manĝi kaj vidi la famajn Tropikanajn gedancistojn; ambaŭ ekskursoj estis iom espartrompaj al mi, kvankam ili donis bonan okazon interparoli kun diversaj esperantistoj.

Estas du neforgeseblaj esperantistoj kiujn mi renkontis. Unu estas juna Haitiano kun kiu mi konatiĝis en la flughaveno en Jamajko. Li estas Bahaano kaj komencanto en Esperanto kaj havas tre malbonan parolmanieron, sed laŭ mia juĝo li estas sincera bravulo. Li ne havis la ĝustan vojaĝkarton por eniri Kubon kaj la landlima funkciulo forturnis lin; mi povis iom helpi, ĉar tuj post kiam oni enlasis min, mi informis la kubajn esperantistojn ĉe la flughaveno kaj iu el ili senhezite rapidis al la funkciuloj kaj sukcesis aranĝi la eniron. Alia estis 75-jara kubanino kiu loĝas en fora provinco kaj instruas Esperanton al malgranda klaso.

Do, kial "terura lando"? Kubo estas malliberejo. Oni povis senti tion ek de la komenco. La sekurecaj antaŭzorgoj en la flughaveno estis eksterordinaraj. La landlimaj funkciuloj estis suspektemaj kaj tute malamikaj; ili fiksrigardis nin

malame kaj longe studis la pasporton kaj vojaĝkarton. Oni forprenis mian revenan flugbileton kaj ne redonis ĝin ĝis la fina momento. Oni povis vojaĝi inter hotelo kaj flughaveno nur per oficiala transporto. Estis ne-esperantistaj funkciuloj (registaraj, mi supozas) kun ni dum la ekskursoj. Mi alvenis ĉe la hotelo posttagmeze je la 1430a horo kie mi atendis ricevi unuaklasan, unupersonan ĉambron, por kiu mi jam antaŭpagis por la tuta semajno. Mi kaj multaj esperantistoj atendis ĝis la 0400a horo en la sekvanta mateno antaŭ ol oni sendis nin aŭtobuse al duaklasa hotelo, al dupersona ĉambro en kiu la "klimatizilo" estis ventumilo kiu iom ĉirkaŭblovis varmegon aeron. Vane esperante ĉambron, ni restis en la hotela atendejo kaj ne povis eĉ partopreni en la konatiĝa vespero. Samideanoj kiuj dormis kelkajn horojn sur la hotela tapiŝo rajtas nomi sin "samtapiŝanoj". Tio estis la unua tago, kaj estis pli da trompoj kaj friponaĵoj dum la tuta semajno. Mi eĉ ne kuraĝis diskuti politikon kun la esperantistaj kubanoj pro timo, ke mi eble kreus embarason por ili: ĉu ili raportu min, ĉu eble mi raportus ilin? Jes, terura, diktatura lando.

Tion dirinte, mi deziras reemfazi, ke la kongreso mem estis valora kaj ĝuebla sperto. La pruvo: mi jam enskribiĝis por partopreni en la 76a Kongreso en Bergen (Norvegio), 27 julio—3 aŭgusto, 1991.

LANGUAGE IN THE NEWS

[When is a language not a language? See the foreword on "the Czechoslovak language" in *Ĉeĥoslovaka Antologio*.]

On October 25, 1990, the parliament of the Slovak republic in Bratislava, Czechoslovakia, made Slovak the official language, but protesters seeking stronger legislation demanded that lawmakers resign. The law was approved by a vote of 82-51 with 10 abstentions after a nearly all-day debate. Thousands of demonstrators had waited outside parliament in Bratislava, the Slovak capital, for lawmakers to decide. Some Slovaks, whose republic makes up the more rural, eastern part of the country, say they have been dominated too long by Czechs from the national capital, Prague.

[The Oakland, CA, *Tribune*, Oct. 26, 1990]

[More on German!]

In an interview that appeared in

Hamburg's *Deutsches Allgemeine Sonntagsblatt* (Aug. 3, 1990), Manfred Heid, one of the directors of the Goethe-Institut (the organization that handles teaching of the German language abroad) declared that in recent years interest in German has been rapidly growing throughout the world. This phenomenon is due not to cultural but to economic reasons. In America, for example, college goals play a role in the learning of German; in Africa and Asia, the purpose is to take care of tourists. On the other hand, in Latin America German occupies the fourth place, after Spanish, English and French.

In the Soviet Union today 9.5 million people are learning German. In Czechoslovakia German is very widespread and interest in German literature is huge.

[Heroldo de Esperanto, Nov. 26, 1990]

[English—one language, indivisible...]

"I have recently purchased *Foucault's Pendulum* by Umberto Eco. I am greatly enjoying this book, but there is an aspect of it that I find intensely irritating. The translators have used American English in the text, hence I keep coming upon words which are misspelt when read in the UK.

"If new works of literature are published in American English for the UK market, it erodes English as a language and promotes the use of the American form in the country where the language originated.

"Picador state that there is no dictate as to which version of English they should use; American English is as good as any other brand. I believe that their real reason is that it is cheaper to produce one version for sale on both sides of the Atlantic."

[Andrew Cooper of Surbiton, Surrey, UK, in the London *Times*, Dec. 13, 1990;

INTRODUCTION OF NEW SCIENTIFIC AND TECHNICAL TERMS INTO ESPERANTO

by Doug Portmann

This is a continuation of the second article in this series, which appeared in issue 1989/7 of the *ELNA Newsletter*. You need some new Esperanto scientific or technical term, but you can't find it in any dictionary. What do you do? For example, how would you find the Esperanto equivalent to these terms: acid rain, black hole, space shuttle, phone (voice) mail, VCR, refuel, biotechnology, personal computer (PC), greenhouse effect, etc...?

I laid down some guidelines for selecting new terms in the previous article. Now I describe here a couple of useful techniques for forming new scientific and technical vocabulary in Esperanto.

The first method is borrowing. Yes, Esperanto has shamelessly borrowed a huge portion of its vocabulary over the years. You could accuse our language of a lack of originality, but other languages, especially English, are also guilty. English borrowings from French and Latin, for example, make up half or more of its vocabulary. So when do we borrow? Let me illustrate by a term familiar to some of you: *algorithm*, a set of instructions executed by a computer. You check the main Esperanto reference works like PIV (*Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*) first, of course, to see if this word was borrowed as "algoritmo". You find nothing. Then you check other languages and find corresponding terms, for example "Algorithmus" in German and "algoritm" in Russian. Reinforced by the internationality of this term, you can now borrow it into Esperanto as "algoritmo" without further ado.

You might recognize that *algorithm* is a Greek word; if in doubt, check a dictionary.¹ They usually tell you what language a word comes from. Greek words, if borrowed into English, are most likely being taken over by other European languages as well. Hence they qualify for Esperanto citizenship under the 15th rule of our Fundamental grammar. Don't be surprised if you aren't the first to borrow such words. Esperantists in other nations are busy looting the international Greek lexicon, too. As a matter of fact, I found "algoritmo" registered in at least one other Esperanto source, the *Deutsch-Esperanto Wörterbuch* (German-Esperanto Dictionary) by Krause (1983).

Just as important as outright borrowing, however, is loan translation (*prunto-tradukado*). Loan translation means translating the meaning, not the form of a word,

into another language. If possible, check to see if other languages are doing the same thing, or you may end up with a loan translation which no one understands. Words like acid rain, black hole, personal computer (PC), greenhouse effect, smoke detector, spy satellite lend themselves easily to loan translation: *acida pluvo, nigra truo, persona komputilo, vitrodoma efiko, fum-detektilo, spiona satelito*. Esperanto authors may even coin such terms with hardly a thought that they are being original. Loan translation better agrees with the spirit of Esperanto, since it doesn't require the creation of neologisms—new root words.

Beware of blind imitations of English terms, even if analogous words seem to exist in Esperanto. A good example is the pair "hardware" and "software", which PIV translates as "hardvaro" and "softvaro". The word elements "hard", "soft", and "var" all exist in Esperanto, but the former two with different meanings than English "soft" and "hard". Thoughtful Esperantists have provided better translations: "aparataro" and "programaro" respectively, making use of the Esperanto suffix "ar". Unfortunately, the Supplement (1987) to PIV doesn't even mention these alternatives.

Here are some other mostly new scientific and technical terms, with their proposed translations into Esperanto:

big bang theory—teorio de la granda krako
catalytic converter—kataliza konvertilo
compact disk (CD)—kompakta disk(et)o
desktop publishing—surtabla publikigo
experimental animal—probesto
freeze drying—kriosekigo
front wheel drive—frontrada transmisio
fuel-injection engine—motoro kun benzina injekto
insect repellent—forpelenzo (de insektoj)
laptop computer—sursina komputilo
microfiche—mikrofiĉo
microwave oven—mikroonda forno
offshore drilling platform—maraborplatformo
pollutant—poluenzo
refuel—replenigi per brulaĵo, repetroli
space shuttle—spacpendolo
scuba diver—akvopulmisto
telex—telefakso, telekopiilo
VCR—aŭdvida magnetofono
videotape—vidbendo
wastewater—eksakvo, uzita akvo

None of these terms are listed in the standard "Esperanto Dictionary" (1969) by Wells. (Wells, however, is generally a good source for technical terms.) The proposed translations are tentative, and it is perfectly possible that a better translation may come into use instead of any of the above. Some of the above translations have been taken from the manuscript of the "Comprehensive English-Esperanto Dictionary" (CEED) by Benson, some are from other sources, and some are my own. It would be interesting to discuss the reasons for selecting the Esperanto terms given in this list, but that would take up too much space. In my previous article I did go into some detail on the process of selection of a number of Esperanto technical terms.

Many Esperanto dictionaries are poor at registering terms consisting of more than one word, such as "desktop publishing" and "greenhouse effect". This is unfortunate for the user, though understandable due to the extra time and space required. In this respect CEED is better than its predecessors.

In this article I have confined myself to technical terms likely to be understood by the ordinary reader. But these are just the tip of the iceberg. There is a huge mass of such terms, which for the most part only specialists (fakuloj) know.

Can I help you with other scientific or technical terms? Or would you like to discuss the vocabulary in this article? Send letters to Doug Portmann, 1517 Raymond Dr. #101, Naperville, IL 60563.

EDITORIAL ADDENDUM

As Doug says, there are other possible translations of some of these terms. Let me propose the following alternative possibilities, without insisting that they are necessarily better than Doug's:

black hole—nigra faŭko
greenhouse effect—oranĝeria efiko
big bang theory—universeksploda teorio
desktop publishing—surtabla eldonado
freeze drying—frostosekigado
laptop computer—surgenua komputilo
pollutant—poluaĵo
space shuttle—orbita navedŝipo
videotape—lumbendo (by analogy with the popular *sonbendo* for audio tape)

¹ Actually, it comes from the name of the medieval Arab geometer al-Khuwarizmi.—editor

MALFUNDE DE LA FANDUJO GRANDA, aŭ

45 tagoj ŝvebe en la kaldrono nomata Usono

de István Ertl

[Antaŭ pli ol unu kaj duono da jarcentoj, la franca verkisto Alexis de Tocqueville verkis baldaŭan klasikaĵon pri la Usona popolo post mallonga vizito al nia tiam nova lando. Ĉu konata esperantista-hungara verkisto kaj redaktoro (kaj lastatempa "talento-triumfinto"—vidu revuon esperanto, okt. 1990) povus fari malpli?]

Duoblan cerban pafon havas esperantistoj, diradas ne malofte mia patrino. (Laŭ ŝia koncepto Esperanto estas manio, kiun kutime akompanas aliaj fiksjaj ideoj, ĝis senespera interplektiĝo.) Ne vojaĝu, filo, en Usonon, ŝi daŭrigis, ĉar ĉiupaŝe vi devos gardi vin de rabistoj, gejoj, droguloj kaj putinoj. (Tiujn kategoriojn, bedaŭrinde, ŝi sufiĉe simile taksas.) Kaj en tiu freneza landego esperantistoj certe estas eĉ trioble cerbopafitaj!, ŝi konkludis.

Sed mi jam posedis en mia poŝo la aviadil-bileton, en mia kapo la kunportindajn antaŭjuĝojn: mia decido neŝanĝeblis. Kiajn antaŭjuĝojn? Nu, ĝenerale pufiĝis min la kultur-orgojlo de eŭropano vizitanta landon de teknokratiaj novbarbaroj. Mia kroma mispenso estis, ke esperantistoj malmultaj kaj malbone parolas en tiu ĉi mondon. La malantaŭon de mia cerbo tamburadis subkonscia angoro: Mi perdiĝos en tiu ĉi Babela Sodomo, ja ne eblas, ke Esperanto same efike helpu en tiu ĉi unulingvujo, U.S.A. (= Unika Savo la Angla).

Kiel klasika ekzemplo de nepreparinta fuŝvojaĝanto, mi staradis senhelpe iun julian vesperon en la novjorka Kennedy Airport—kaj tiam okazis...

Okazis neniu Esperanta miraklo. Nokte hotelo en Manhattan ŝrumpiĝis mian monujon, tage ĉiuj eblaj kontaktuloj forestis aŭ telefonis kun iu alia... Koncize, mia kredo je la helpopovo de Esperanto jam ekŝanceliĝis, kiam vendredan vesperon mi konatiĝis kun la novjorka kremo en ties kunven-picejo—kaj ekde tiam ĉio glite glatis; glutis min la dia(bla) cirklo de la verda movado.

Mi ne rakontos al Vi, kiel mi gapis el aviadilo la ĉielskrapulojn de Novjorko; mi ne perfidos, kiel mi perdis kvin dolarojn en Las Vegas; mi malmencios, kia sento estis blankuli sola en Detrojta buso; mi prisilentos, kiel agrablis reinfaniĝi en Disney-lando; mi preterlasos la ŝvitantajn murojn de tagmeza New Orleans; mi ne analizos la sankte gravan diferencon inter

Kebekio kaj Kanado, resp. Kanado kaj Usono; mi sekretos, kial mi preferis Wendy's al McDonald; mi ne priskribos la liton el rezinodoraj pinoplingloj, kie mi tranoktis subĉiele; mi retenos por mi la odoron de oceano kaj de burritos el San Diego; mi ne priŝtraktos la miope Usoncentrajn novaĵprogramojn de la televido; mi kaŝos mian envion pri la kvanto de ĉiunaciaj, ekzotikaj sed pageblaj manĝejoj; mi rifuzos paroli entute pri tio, kiel la lando Usono energie kaj ridete gajnis mian hezitantan simpation.

Ne; anstataŭ tiuj banalaĵoj mi diros al Vi, ke sur mia persona mondomapo Usono fariĝis tre verda lando. Laŭ membrulisto de ELNA en la senfinaj vastoj de la Nova Mondo dissemiĝas apenaŭ pli ol mil verdaj punktoj—sed ili lumas intense! Por la usonaj esperantistoj, kiujn mi renkontis, nia lingvo estis certe pli ol lingvo, kaj pri nia "interna ideo" ili pli seriozas ol miaj konatoj en Eŭropo. Se iu bezonas sanigan injekton de miksitaj idealismo kaj praktikeco, tiu venu en Usonon.

Estus longe—kaj mi implikiĝus en miajn argumentojn—pricerbumi, kiagrade Esperanto estas serioza afero. Mi vivas ĝin kiel ludon. Dum en Hungario la reguloj de la ludo *historio* ŝanĝiĝas tro ofte kaj rapide por tio, ke oni tenu sin ĉiam al la reguloj, usonanoj bonŝance povas kaj kapablas laŭregule ludi la ludojn: de demokratio kaj ekonomio, ekzemple. Tiel same pri Esperanto: ĝi estu ludo serioza, "nobla hobia", kiel por Kalocsay.

Tion usonanoj bone komprenas. Sed en sia Esperanto-vivo ili ludas ankaŭ kelkajn el la ludoj, pri kiuj Eric Berne rakontis en *Games People Play*: nu, ekzemple laludon "Kiom-mirinda-vi-estas-sinjoro-profesoro". Eksterlandan esperantiston ili flatas kun minus-komplekso: "Ho, vi en Eŭropo tiom bone parolas la lingvon, ĉi tie ni estas ĉiuj komencantoj..." Kaj ne estas tiel. Veras, ke usonanoj havas averaĝe malpli da personaj kontaktoj kun alilandaj esperantistoj, sed tio ne malakrigas ilian konsciecon pri la lingvo-ĝusto. Junaj eŭropanoj ofte parolas pli neglekteman Esperanton, ja "en nia medio oni ĉiukaze komprenos"... Fakte, se la Akademio forigus la akuzativon (eĉ tio ne tro surprizus min post la landnoma historio), usonanoj parolus senriproĉan

Esperanton...

Nu, mi ĝeneraligas kaj troigas. Sed ŝajnas al mi, ke la movado en Usono vivas en kondiĉoj samtempe pli favoraj kaj pli malavantaĝaj: ĝi poras radikalan solvon por la monda lingvoproblemo en kontinento da lando, kie tiu ŝajnas solvita; sed ĝi agas en socio, kiu traktas alternativajn pensmanierojn kun bonvola intereso (aliaj dirus: sendanĝera indiferento). Se aldoni, ke la multkulture unueca Usono nuntempe tamen ek-speras plurlingvecon, kaj eble la tempoj de la Granda Fandujo estos baldaŭ for, tiam eblas vidi pli da ŝancoj por nia strangula movado en la Usono de la venonta—jarmilo...

La prospero dependos ankaŭ de tio, ĉu oni sukcesos gajni (la vorton "varbi" mi malŝatas) pli da "mezaj" usonanoj: da tiuj, kiuj spektas bazpilkon, ofte ŝanĝas loĝlokon kaj aŭtomobilon, frekventas rapidmanĝejoj ktp. (ĉu daŭre miaj antaŭjuĝoj?). Da tiuj, kiuj ne havas cerban pafon, dirus mia patrino. Ja en Usono, same kiel en la cetera mondo, la movado konsistas ne malgrandparte el homoj iel aŭ tiel "elpendantaj" el la normala socio: poliglotoj, enmigrintoj, gejoj, eŭropemuloj, altkulturuloj... Ŝovu Esperanton en la ĉiutagan hamburgaĵon!


Mi rimarkas, kiom arogante sonas miaj cerbumoj: kvazaŭ unu kaj duono da monatoj sufiĉus por povi doni saĝajn konsilojn! "Fiŝo scias pri naĝo ankaŭ sen via saĝo." Ĉu mi rajtas plendi, ke la ELNA-libroservo forofertas poeziajn valoraĵojn je ridinda prezo pro publika senintereso, se mi mem hastis profiti la okazon? Ĉu filozofumi pri movadaj ŝancoj en Usono, dum en Hungario la senkompate ekmerkata ekonomio apopleksiĝe nokaŭtas la Hungaran Esperanto-Asociacion? Ĉu entute tedi vin plu, kara leganto, kiu nun suspiras: ĉu multaj tiaj vizitantoj el Eŭropo ankoraŭ plagos nin, eĉ trudante siajn postvizitajn viziojn senvice sur la paĝojn de *Esperanto U.S.A.*?

Restas danki ĉiujn, kiuj min gastigis trae en la lando: listigi iliajn nomojn estus longe. Ili estas la inta, anta kaj onta movado de Usono en Kalifornio, Malkalifornio (Novjorko), Arizono kaj Detrojto: kelkaj verdaj punktoj sur la Esperanta mapo de Usono, kiuj fariĝis veraj, vivaj, viglaj vizaĝoj dum mia vojaĝo.

CALENDAR

The calendar is a list of a few Esperanto-oriented events, regional, national and international, that we think would be of interest to some or all of our readers. For your information, we include the primary language(s) of each event. Where known, telephone numbers include national and area codes in parentheses; to direct-dial to any national code but 1, prefix with 011.

- 30 March-2 April 1991:** Conference of SAT-Friends in Amboise, France. Main subject: protection of rivers and waters. Films, audio-visual presentations, concert of the group Kajto. Esperanto. For information: Marko Noulin, Les Monts, F-41360 LUNAY, France.
- 5-7 April 1991:** All-California Esperanto Conference at The Sandman Inn, Santa Barbara, California. Esperanto. For information: Esperanto-Rondeto de Santa Barbara, 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara CA 93111-2521.
- 19-22 April 1991:** International colloquium "The Original Literature (of Esperanto)" in Vienna. Esperanto. For information: Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Michaelerkuppel, A-1010 WIEN, Aŭstrio.
- 23-28 April 1991:** Esperanto Week in Poprad, Czechoslovakia. Subject: "The birth of a language: The first years of Esperanto". Esperanto. For information: Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Michaelerkuppel, A-1010 WIEN, Aŭstrio.
- 27 April-4 May 1991:** Practical Development of Esperanto Teachers. Presentation of various teaching methods, theoretical and practical advice. Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 27 April-4 May 1991:** International Children's Meeting. Courses, walks, recreation. Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 9-10 May 1991:** International Conference "Railways on the Threshold of the 3rd Millennium" in Brno, Czechoslovakia. Czech, Slovak, English, Esperanto (simultaneous translation). For information: Dr. Petr Chrdle, VUZ-Fervoja Esplorinstituto, U Luzickeho seminare 3, CS-11857 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.
- 10-12 May 1991:** Northern California Senkrokodilla Weekend at Point Bonita YMCA on the Marin Headlands north of the Golden Gate. Subject: "Esperanto Periodicals." Esperanto. For information: Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj, P.O. Box 324, Berkeley, CA 94701-0324, tel. (415) 770-1452.
- 11-18 May 1991:** 43rd Conference of the International Federation of Esperantist Railway Workers in Brno, Czechoslovakia. Esperanto. For information: Dr. Petr Chrdle, VUZ-Fervoja Esplorinstituto, U Luzickeho seminare 3, CS-11857 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.
- 17-30 June 1991:** International Meeting of Friends. Non-mandatory program: courses, guided conversation, walks, excursions, recreational evenings. Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 1-8 July 1991:** Seminar for Cseh-Method Teachers. Seminar A: Course for beginners, practice, excursions, recreational evenings. Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 1-19 July 1991:** Summer Esperanto Workshop at San Francisco State University, San Francisco, CA. English and Esperanto. For information: Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010, tel. (415) 342-1796.
- 2-11 July 1991:** Scout campout Skolto '91 in the Beskidy Mountains of southern Poland. Esperanto. For information: Carola Antskog, Källkullen, SF-25700 KIMITO, Finland, tel. (358 25) 3146, or Georgo Handzlik, ul. Braterska 41, PL-43-346 BIELSKO-BIALA, Poland.
- 6-11 July 1991:** Midsummer Esperanto Meeting in the forest community of Rautavaara, Eastern Finland. Beginners and Advanced Esperanto Courses, lecture series, hiking and bicycling. Esperanto. For information: Esperanto-Klubo de Helsinki, Pengerkatu 18 A 86, SF-00500 HELSINKI, Finland.
- 6-14 July 1991:** Europe-Asia-91 Conference in Sverdlovsk (Ekaterinburg), USSR. Subject: East-West, What Differences and What In Common? Esperanto. For information: SU-620077 Sverdlovsk 77, ab. ja. 67, USSR, fax (3432) 22 23 46 Esperanto, Telex 411855 Forum SU Esperanto.
- 8-13 July 1991:** 4th Midwest Esperanto Classes and Conference. Esperanto and English. For information: Sherry Wells, POB 1338, Royal Oak, MI 48068, tel. (313) 543-5297.
- 9-22 July 1991:** Lectures and Courses: "The History of Europe Through the Works of Julio Baghy and Kalman Kalocsay". Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 14-19 July 1991:** 51st Spanish Esperanto Congress, La Laguna, Canary Islands. Esperanto. For information: Esperanto, Apartado de Correos 53, D.p. 38200, LA LAGUNA, Tenerife, Spain.
- 20-25 July 1991:** 39th Annual Conference of the Esperanto League for North America, Raleigh-Durham, NC. Esperanto. For information: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, tel. (415) 653-0998.
- 20-26 July 1991:** 47th International Youth Congress of the World Esperantist Youth Organization, Karlskoga, Sweden. Subject: World Movements. Esperanto. For information contact La 47-a IJK, Box 4532, S-102 65 Stockholm, Svedio.
- 23 July-5 August 1991:** Learn and Practice I: "The Art of Translating". Presented by George Lagrange. Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 27 July-3 August 1991:** 76th World Esperanto Congress, Bergen, Norway. Esperanto. For information contact UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, The Netherlands, tel. (31 10) 436 10 44.
- 6-19 August 1991:** Learn And Practice II. Courses, guided conversation, excursions, recreation. Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 20 August-2 September 1991:** End-of-Summer School. Courses, guided conversation, excursions, recreation. Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 11-19 January 1992:** 28th Australian and 57th New Zealand Esperanto Congress, at the University of West Sydney. Esperanto. For information: S-ro Les Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095, Australia.
- July 1992:** 48th International Youth Congress of the World Esperantist Youth Organization, Czechoslovakia. Esperanto. For information contact TEJO at the address of UEA.
- July 1992:** 77th World Esperanto Congress, Prague, Czechoslovakia. Esperanto. For information contact UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, The Netherlands, tel. (31 10) 436 10 44.
- 17-22 August 1992:** 5th Pacific Esperanto Congress, Huanghai Hotel, Qingdao, China. Esperanto. For information: Esperanto Travel Service, 6104 LaSalle, Oakland, CA 94611, tel. (415) 339-2001.
- July 1993:** 49th International Youth Congress of the World Esperantist Youth Organization, Catalonia or Italy. Esperanto. For information contact TEJO at the address of UEA.
- July 1993:** 78th World Esperanto Congress, Valencia, Spain. Esperanto. For information contact UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, The Netherlands, tel. (31 10) 436 10 44.
- July 1994:** 50th International Youth Congress of the World Esperantist Youth Organization, Korea (South). Esperanto. For information contact TEJO at the address of UEA.
- July 1994:** 79th World Esperanto Congress, Seoul, Korea (South). Esperanto. For information contact UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, The Netherlands, tel. (31 10) 436 10 44.
- July 1995:** 51st International Youth Congress of the World Esperantist Youth Organization, Finland. Esperanto. For information contact TEJO at the address of UEA.
- July 1995:** 80th World Esperanto Congress, Tampere, Finland. Esperanto. For information contact UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, The Netherlands, tel. (31 10) 436 10 44.



LETEROJ

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc.]

I need help in locating any and all research that has been done on selecting an international language, testing of languages and especially any and all research about Esperanto. Please send me any information you can find.

Something that may be of value to members in the future will be Masters Thesis research about finding the most suitable international language. Wayne State University has accepted my Masters Project title of "What is the best language to use for the international language to be taught at the elementary level?" The results of screening hundreds of languages and as much research as I can find and do will be made available to members.

Wesley Arnold
3972 Dallas
Warren, MI 48091

Reginald Reid sent me the cassette recording of the latest *Esperanto USA*, I received it yesterday. I was distressed to read about the ELNA member who sent objectionable literature to an Iranian Esperantist.

I feel sure that it was not a member of BEL [Bahaa Esperanto-Ligo], as we have been told not to do this by the Universal House of Justice.

Would you be willing to send me a copy of that literature, which appeared in English? And also, could you send me the name of the sender?

If it is not a member of BEL, we can do nothing but leave him to the attention of Bahá'u'lláh, and I certainly wouldn't want to be in his shoes. But if it IS a member of BEL, that person should be admonished.

I think also that this should be mentioned in our quarterly organ, *BEL-Monda Letero*, the BEL members should be reminded from time to time not to do this.

I was somewhat disappointed that this issue of *Esperanto USA* didn't have any news of the establishing of a committee for blind Esperantists in the U.S. Do you think it will come out in the next issue?

Roan O. Stone

[I'd prefer not to make any names public, if possible; if the person in question was not admonished by reading my editorial, then he is presumably unadmonishable. As to services for blind Esperantists in the United States, please note the announcement in the last issue of *Esperanto USA*.]

Ĝus ricevinte vian "Newsletter"-n 1990/6 kaj trafoluminte ĝin, mi iom surpriziĝis pro via neinformiteco pri la poŝtkoda situacio en unuiĝinta Germanio, kvankam ĝi estis priskribita en pluraj E-lingvaj periodaĵoj, ekz. "Monato".

Kiel ajn, jen mi ŝatus plenigi vian scio-"truon": La poŝtkodoj de kaj okcident-kaj orient-germanaj urboj restas la samaj kiel antaŭ la unuiĝo, nur ke oni indiku "W" resp. "O" por okcidentaj ("West") resp. orientaj ("Ost") kodoj. Do, letero el ekz. Usono aspektu jene: D - W/O - (kodo) (urbo).

Klaus Dahmann
Vic-sekretario
Germana Esperanto-Junularo

[Kvankam la jena poŝtkarto, sendita al la redaktisto de iama studento lia, ne rilatas al ELNA, eble la legantoj trovos ĝin interesa... kaj instiga.]

Mi partoprenas la unuan kongreson en Afriko. Ĉeestas ĉirkaŭ cent kvindek homoj, ĉiu afrikano junas, kaj ankaŭ partoprenas ses eŭropanoj.

Mi nun loĝas en Benino, instruante la fizikon k ĥemion franclingve. La franca konfuzas mian Espon, do mi ĉeestos la beninajn kunvenojn.

Kirk Miller

En la gazeto *Esperanto*, de UEA [okt. 1990; n-ro 1018], mi legis la interesan novaĵon, ke ni, esperantistoj en Usono, estas mediokruloj. Mi ne sciis ĉi tion.

Ŝajne, la sola malmediokrulo en tiu ĉi

vastega Usono estas S-ro Ralph Dumain, la brila konstatinto de nia mediokreco, Kiel bedaŭrinde!

Kion jam faris por la Movado la novulo Ralph Dumain, S-ro Redaktoro? Li supozeble jam faris multegon, ĉar li estas malmediokra, sed mi neniam aŭdis pri li dum miaj kelkaj jaroj da esperantado.

Mi diras lin novulo nur pro la 'saĝeco' kaj 'matureco' de liaj vortoj. Ĉu mi probable eraras kaj li estas knabo, S-ro Redaktoro?

Mi certas, ke li ne estas riĉulo, sektulo, religia fanatikulo aŭ strangulo, pro lia 'prudenta' kuraĝo.

Ĉu li estas usonano aŭ kubano? Laŭ la supra novaĵo li estas el Usono, sed eraroj okazas, ĉu ne?

Carlos I. de Jesus
[Se la leganto ne jam konstatis tion, la supre aluditan novaĵon verkis s-ano Ralph Dumain, usonano, ne knabo kaj ankaŭ ne aparte maljuna aktivulo de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono, DC, kiu en sia regiono faris plurajn bonajn agojn por la Esperanto-movado. Kiuj volas pli multon scii pri la unuflanka milito de s-ano Dumain kontraŭ aliaj (ne ĉiuj) usonaj esperantistoj, tiuj legu pasintajn numerojn de La Kancerkliniko, kie troviĝas rektaj atakoj kontraŭ la Vic-Direktoro de la C.O. de ELNA, la Redaktoro de Esperanto USA, kaj iu alia nenomita persono, kiu iel allogis la malŝategon de s-ano Dumain.]

Kiel vi plejeble scias, mi aranĝas la venontan Konferencon de Esperanta Grupo Intermontara en la nacia parko Flava Ŝtono en septembro la 6a ĝis 8a.

Ni ne malinvitas ne-EGI-anojn al tiu konferenco. Male, ni bonvenigos ĉiun samideanon. La EGI-anoj jam havis la unuan rajton aliĝi, nun estas kelkaj restantaj neplenaj lokoj por interesataj ne-EGI-anoj.

Se vi volas, vi rajtas reklami tion inter ELNAanoj, ke ili skribu al mi ĉe la [suba] adreso, se ili volus ĉeesti l' aferon, kiu inkluzivas ekskursojn en la naciaj parkoj gvidataj kaj en Esperanto kaj angle.

Mi jam ricevis sufiĉe da kotizoj, ke mi kapablas teni certan nombron da ĉambroj rezervitaj. Sed kuraĝigu ilin ne prokrasti kontakti min, ĉar poste povus esti malfacile akiri ĉambrojn.

Rikardo Ranc
20 Highland Road
Brentwood, NY 11717

ANONCOJ

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondecigi definitivajn plenumojn de io ajn promesita en anonco.]

“Ni ŝate anoncas al vi la eventon de **51-a Hispana Kongreso de Esperanto**, kiu okazos en la urbo La Laguna (Tenerife—Kanariaj Ins.) dum la periodo de 14-a ĝis 19-a de julio de 1991. En la kadro de la kongreso oni omaĝos per diversaj kulturaktoj al D-ro Juan Régulo Pérez agnoske al lia kontribuo al la Esperanto-Movado, precipe en la eldonista tereno kaj instruado.” Por informoj: **Esperanto, Apartado de Correos 53, D.P. 38200 LA LAGUNA—Tenerife, Hispanio.**

Inter la 6a kaj 11a de julio en 1991 oni proponas **Sommermezan Esperanto-Renkontiĝon**, kiu okazos en Arbara Gastejo, internacia junulara centro en komunumo Rautavaara en Orienta Finnlando. La regiono estas maldense loĝata, meze de vastaj arbaroj kaj freŝakvaj lagoj. Vi povas ĝui la naturon migrante en arbaro aŭ naĝante en lago. Nokto ne ekzistas, nur kelkhora krepusko. Okazos kurso por komencantoj (instruos Eva Farkas el Hungario), progresiga kurso (instruos Andrzej Pettyn el Pollando), prelegserio por seriozaj esperantistoj, komunaj prelegoj kaj distraj vesperoj, piedaj aŭ biciklaj migradoj en la ĉirkaŭa naturo, gustumado de lokaj frandaĵoj, kaj tuttaga aŭtobusa ekskurso al Iisalmi. Por aliĝilo, skribu al: **Esperanto-Klubo de Helsinki, Pengerkatu 18 A 86, SF-00500 HELSINKI, Finnlando.**

Skolta Esperanto-Ligo aranĝas **tendaron Skolto '91** ĉe la Beskidymontaro en suda Pollando inter la 2a kaj 11a de julio, 1991. Dum ĝi okazos krom la ordinara skolta programo ankaŭ dunivelaj kursoj de Esperanto, kompreneble ankaŭ laŭ skolta stilo. Por

la internacia kurso por komencantoj ni postulas aĝon de 15 jaroj por ebligi kiel eble plej efikan instruadon. Pliajn informojn kaj multlingvan informilon donas: **Carola Antskog, Källkullen, SF-25700 KIMITO, Finnlando, tel. +358-25-3146, aŭ Georgo Handzlik, ul. Braterska 41, PL-43-346 BIELSKO-BIALA, Pollando.**

La spiritisma komunumo de la regiono de Sao José do Rio Preto, ŝtato San-Paŭlo, pere de la Sociedade Espirita de Beneficencia (Bonfara Spiritisma Societo), kiu agadas ĉe la fakoj de sano, edukado, socia promocio kaj instruado de Esperanto, **konstruas Spiritisman Regionan Hospitalon kaj Spiritisman Edukadan Instituton**, kiuj, antaŭ ĉio, helpas al la plej malriĉaj homoj en la regiono. Tiel, ni petas la reagon de la simpatiuloj de ĉi tiu ideo. Donacojn oni povas sendi al: **Sociedade Espirita de Beneficencia, Av. Octavio Luiz De Marchi 333, Caixa Postal 126, 15.035-SAO JOSÉ DO RIO PRETO—SP, Brazilo.**

La **4a Mezlanda Konferenco kaj Klasoj** okazos inter la 8a kaj 13a de julio en difinota urbo en la nord-centra Usono. Por informoj, bonvolu kontakti: **Sherry Wells, P.O.B. 1338, Royal Oak, MI 48068, tel. (313) 543-5297.**

Studento en la Fako-Altlernejo de Reutlingen, Germanio, por Tekniko kaj Ekonomiko, en la speciala fako “Ekstera Komerco”, devas eklerni la “**amerikan manieron de vivo**” kaj pliperfektigi siajn konojn pri la angla kaj hispana lingvoj en Usono inter marto kaj aŭgusto, 1992, prefere en suda Kalifornio, Teksaso aŭ Florido. Kiu povas helpi lin kontaktiĝi kun industriistoj, bankistoj, komercistoj, aŭ firmaoj, kiuj estus pretaj kaj taŭgaj dungi germanan studenton dum 26 semajnoj en tiu periodo, bonvolu kontaktiĝi kun: **Janek Bender, Senefelderstr. 19, DW-7312 KIRCHHEIM/TECK,**

Germanio.

Oni nun esploras la eblecojn okazigi ĉirkaŭmondan ekspedicion de kvin ĝis dek taŭgaj homoj, esperantistoj, per ekologiaj nedifektaj transportrimedoj, ekz. bicikloj kaj piedoj. La proponita trako kondukus la ekspedicion tra la Okcidento de Usono, de la kanada ĝis la meksikia landlimo. Kiu havas intereson pri tiu ekspedicio, ĉu por partopreni, ĉu por subteni, bonvolu kontaktiĝi kun: **Vlasta Hájková, 252 56 SKOCHOVICE 43, Ĉeĥoslovakio; aŭ, Vlasta Hájková, Esperanto-Junularo, 110 00 PRAHA 1, Jilská 10, Ĉeĥoslovakio.**

Roan Stone raportas, ke longjara samideano ŝia en Ĉeĥoslovakio volonte sendos aŭ unu ekzempleron aŭ tutjaran abonon je la Esperantobrajla monata gazeto *Aŭroro* al tiuj blindaj gesamideanoj, kiuj petos ĝin. Bonvolu kontakti: **Vuk Echtner, Baldovská 583 46A, CS 344 01 DOMAZLICE, Ĉeĥoslovakio.**

Se vi interesiĝas pri paco kaj pacaj aferoj, eble vi volas kontakti la pacifistan movadon TUTMONDE. Kontaktadreso: **TUTMONDE, Apartado 313, E-08220 TERRASSA, Hispanio.**

Pasigu semajnon en Vieno, ĝuante la belan urbon kaj samtempe partoprenante la internacian kolokvon “**La Originala Literaturo**” (19a ĝis 22a de aprilo 1991). Post tio vi povas utiligi vian restadon en mez-Eŭropo aliĝante al la Esperantosemajno en Poprad (Ĉeĥoslovakio), kies temo estos “**La naskiĝo de lingvo: La unuaj jaroj de Esperanto**” (23a ĝis 28a de aprilo). Paralele en ambaŭ aranĝoj estos Cseh-metodaj kursoj por komencantoj. Do, ankaŭ krokodiloj povas veni! Por pliaj informoj: **Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Michaelerkuppel, A-1010 WIEN, Aŭstrio.**

RECENZE

Damir Mikuličić: "O" kaj aliaj rakontoj. El la serbokroata tradukis Jovan Zarković. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1988. 216 p. Ĉe ELNA: Kodo OKA001, prezo \$7.25 (nemembroj)/\$6.90 (membroj).

Jen kolekto de 13 sciencfikciaj rakontoj de unu verkisto tradukitaj en Esperanton. La libron oni atentigis en San Francisko somere de 1990, ĉar la tradukinto estis instruisto, plejparte en la baza nivelo, en la tiujara kursaro de la San-Franciska Ŝtata Universitato.

Iuj legantoj eble rimarkis malfavoregan recenzon aperintan en la revuo *esperanto*, 1990, n-ro 7-8. Recenzis Georgo Kamaĉo, lastatempe multfoje premiita verkisto, elstara "nova talentulo". La malŝato rilatas precipe la rakontojn kaj ties enhavojn, kiujn li opinias banalaj kaj neoriginalaj. Li mallonge mencias kaj malaprobis la nekutimajn stilaĵojn.

Kontraste, en la revuo *La Gazeto* (n-ro 30), Anatolo Gonĉerov aplaudas la stilaĵojn kaj iom mallonge laŭdas ankaŭ la enhavojn.

Kiam libro estigas diskutadon kaj disputadon, endas mem legi por elfari la proprajn impresojn kaj konkludojn.

La intrigoj al mi estis sufiĉe kontentigaj. Du-tri-loke mi tro facile antaŭdivenis surpriz-finon nesufiĉe kaŝitan. Tiu kapablo venis eble pro ekzercado je la rakontoj en la antaŭ jaroj eldonita *Weird Science* kaj similaj bildstriaĵaj periodaĵoj. Aliaj eble trovis similan en la konstruoj de la noveloj de O. Henry. Homoj sen tia sperto eble pli facile supriziĝas.

Sed ol la intrigojn mi trovis pli fascinaj la stilaĵojn. Mi provizore grupigis ilin laŭ dek kategorioj.

- A. Leksemaj radikoj uzataj prepozicie
- B. Neordinaraj kunmetoj (eble nelogikaj)
- C. Kunmetoj korelativaj
- Ĉ. Uzoj de /-um-/
- D. Kunmetoj kun partikulo+leksemo
- E. Diversaj aliaj kunmetoj

F. Uzoj de participoj aŭ finaĵoj
G. Prepozicioj uzataj alifunkcie
Ĝ. Substantivigoj de partikuloj aŭ sufiksoj

H. Diversaj aliaj uzoj
(La supraj terminoj estas laŭokazaj kaj ne sekvas ian specifan lingvistikan modelon.)

Ekzemploj inkluzivas:

A. Mi rulumis ilin form zono ĉe mia korpo.

B. ...60 kilometroj pohore... Ĝi datumas el la fino de la dudeka centjaro...

C. ...sen ajnies helpo... foriros ĉiuj krom ti-kiuj tenas la fingron sur pafisorto.

Ĉ. "Vilo, ne umu, hodiaŭ ne estas la ŝercofesto..." ...antaŭ umsepek jaroj.

D. la kolegoj...intencis jamkondamni la infanojn... La istoj...diskutis la ĵushumoron de la infanoj

E. Ni organizos prookazan festeton... "...informi min pri seinteresaj trovejoj."

F. la ontaj gepatroj, la os-infanoj
G. Tio estas malĉea konstruaĵo ekster la akuŝejo

Ĝ. La perturboj...estigadis dum tujo koridorojn...

H. El ĉi-disto li ne povis legi ĝin...

Jen rimedoj riĉigi la lingvon, alternativaj al tiuj de la naturalismaj (neologismaj) skoloj aŭ de ĝisostaj aŭ neaŭdacaj fundamentistoj. La unuaj ofte malrapidigas la legadon kaj postulas tro multe da ŝarĝo elserĉadi nekonatajn vortojn en vortaro aŭ glosaro. La duaj ofte prezentas senimagipovan, foje neprecizan legaĵon.

Sed la rimedo de Zarković povas stimuli la lingvan frandadon al neantaŭe imagitaj plialtaĵoj. Jen bonega esploro de la lingvo-latentoj. Oni diras, ke ankaŭ en la originala serbkroata la lingvaĵo estas simile neordinara. Bedaŭrinde, la plejmulto el ni ne kapablas fari rektan interkomparon tiurilate. Similaj eksperimentaĵoj troviĝas en du aliaj traduk-kolektoj liaj: *Ŝtona dormanto* (poemaro) kaj *Simha, Rakonto pri ĝojoj* (novelaro). Ankaŭ la poemaron mi jam tutlegis kaj trovis simile frandebla kaj eĉ pli eksperimente aŭdaca.

Ĉu iuj el la provaĵoj iam enradikiĝos en la parola Esperanto? Ŝajne, nur malgranda proporcio el neologismoj atingas tian honoron. (Kiomfoje, ekzemple, iu parolas pri afero *mava*?) Sed, kredeble unu aŭ alia el la ĉi-traktitaj provaĵoj povas spontanee ekesti fluo de ordinara konversacio, eĉ se neniam antaŭe renkontita en skribo.

Al tiuj, kiuj mem volas fari eksperimentan verkadon artan (kaj eble foje teknologian?), jen libro vere studinda. Kaj certe oni rajtas samtempe ankaŭ ĝui la rakontojn.

R. Jaderstrom

(1) Peneter, Peter: *Sekretaj Sonetoj*. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1989. 104p. Ĉe ELNA: Kodo SEK002, Prezoj \$12.00 (nemembroj)/\$11.40 (membroj).

(2) Imby, Emiano: *La Dekdu Noktoj de Satano*. Prilly: Kooperativo de Literatura Foiro, 1990. 129 p. Ĉe ELNA: Kodo DEK007, Prezoj \$35.00 (nemembroj) / \$33.25 (membroj).

Geviroj renkontiĝas, pli malpli hazarde: "...en hejma balo, sub la lustr-flamoj..." (1-24), "...en vagonar-kupeo...vidalvide..." (2-21), kaj homaj rilatoj komenciĝas, eĉ se tute ne antaŭatendite: "Vi plaĉas al mi, tion mi diras al vi rekte..." (2-21), kun sekvoj eĉ malpli antaŭvideblaj: "...viva, plora-pisa-kaka pup'..." (1-80). Tio estus tre, tre mallonge, amhistorio, el kiu gajnas, fine, la tutmonda loĝantaro. Nu, da tiaj historioj la literaturo abundas. Kaj lastatempe, la porna kino sufiĉe detale (iuj dirus: tro detale) vidigas al ni la homajn rilatojn, en ties plej intimaj formoj.

Prude, oni evitas tiajn subjektojn, forgesante (ĉu?), ke ĝuste el tiuj intimaj rilatoj devenas ĉiuj ni ["oni ĝin faras, sed ne priparolas"] (1-65). Tamen, kelkaj (pli kuraĝaj aŭ malpli prudaj?!) ne hezitas eniri detalojn, garantiante al si lokon en la Infero.

Por certigi, ke la vivo (kaj la loĝantaro)

bone disvolviĝas, oni komencas jam sufiĉe frue la lecionon: "En rondo geinfanoj dancadis inter svarmo da geaj seksorganoj, kaj poste mem sterniĝis, interbrakumis, kisis, knabetoj al knabinoj en la piĉeton pisis." (2-24). Por eksterteranoj, la aferoj okazas iom malsame, sed okazas. Se oni povas krei alie ol per seksumado, tiu ĉi iĝas nur plezura afero: "Jehovo ĉion tion vidis kun granda rido, la Sankta Membro ofte stariĝis kun rigido, kaj tiam li alvokis kerubon aŭ serafon, kaj li en tiun pafis deposte plenan trafon." (2-24)

Eĉ gee, fojfoje—por eviti enuon—oni aplikas malpli ortodoksajn praktikojn: "Kapuĉon mian dume mano lula apertas-fermas kun karesa tuŝ", kaj nun, nun glitas la humida pluŝ' de via lango, kun vibrado brula..." (1-70), aŭ "numero dolĉa: 69" (1-69). La listo (ĉerpita el la samaj du fontoj) povas esti multe, multe pli longa, sed naskiĝas, jen, demando: kio se ĉiuj ĉi ne sufiĉas?

Nu, kelkaj estas evitendaj: "...la pugofiko estas privilegio dia!" (2-31) kaj, *konsilo al geknaboj*: "Nur solaj, kaj en kaŝo volupti ili rajtas: la knabo per la mano, knabinoj per maldikaj kandelo aŭ rafano." (2-27). Sed, por plenkreskuloj restas ankaŭ la ĉirkaŭa faŭno: "...la hundo kaj virkapro...kaprinoj...eĉ taŭro...virporkoj..." (2-30, 31)

Sendube, en tiaj kondiĉoj, la privilegiato "rekompencas" kaj...la malfeliĉa sperto de Sodomo estas jam konata. Ankaŭ por la aliaj, kiuj "...sidante trajnon kaj aŭtomobilon, banante sin en kuvo kaj river'...de l' volupto faris sorĉan spilon..." (1-77) la rekompenco povas veni sub formo de "...ĝerma id'..." (1-79), tiel ke post kelkaj jaroj, "...l' infanoj...imitas plenkreskulojn..." (2-27)

Maldece, ĉu ne? Sed ne por Peter Peneter kaj Emiano Imby, nek por la Eldona Fako de la Hungara Esperanto-Asocio kaj Kooperativo de Literatura Foiro, kiuj verkis, respektive eldonis tiajn fiajn librojn (eĉ kun trafaj desegnaĵoj).

La du aŭtoroj ĵus menciitaj estas fakte unu sola persono, kara (ĉu eĉ post tiaj libroj?) al nia memoro, kaj kies centan datrevenon ni festos ĉi-jare: Kalman Kalocsay. La du menciitaj eldonintoj meritas gratulon pro sia kuraĝo kaj pro la alta kvalito (bedaŭrinde, ankaŭ prezo) de la du libroj. Kaj laŭdojn meritas ankaŭ

legantoj, precipe se ili malatentis la vokon de la aŭtoro: "Leganto! Jen la lasta voko! Tuj sekvas jam danĝera loko! Forĵetu min! Bedaŭrus mi, Se vin mortigus nervo-ŝoko!" (1)

Mi sentas min devigata doni al vi la originalan averton, kaj sekve, prenas desur miaj ŝultroj ĉian respondecon. Mi ne instigas vin legi tiajn librojn. Mi jam faris tion, kaj sendube havos la okazon vojaĝi en la barko de Ĥarono sur la rivero Aĥerono.

Ionel Onet

[*Nota de la redaktoro: Nek Esperanto U.S.A. nek la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko instigas la legantojn legi la du ĉi tie recenzitajn librojn kaj senkonsidere obei la konsilojn entenatajn en ili. ELNA restas organizo religie, politike, ekonomike kaj sekse neŭtrala.*]

Urbanová, E., Silfer, G., k.a.: Debato pri la "Praga Skolo". Milano: Kooperativo de Literatura Foiro, 1989. Kolekto de la Ankro n-ro 2. 59 p.

Daŭre furiozas en Esperantio debatoj pri diversaj prilingvaj sintenoj. La jena koncernas la t.n. Pragan Skolon: mallonge, la sintenon, ke necesas "abunde kaj redunde" pligrandigi la esperantan vorttrezoron. (*Abunde kaj Redunde* de Josef Rumler estas broŝuro de 1986 kiu prezentas tiun tezon.)

La debato akcentiĝis en la kvina Internacia Literatura Forumo en Budapeŝto en 1986, en kiu oni diskutis la pozicion de Kalocsay en la Esperanta literaturo. Sekvis artikoloj en la revuo *Literatura Foiro*. La jena kolekto de 14 artikoloj baziĝis plejparte sur du aperintaj en LF 111 (1988): unu de E. Urbanová (por) kaj la alia de G. Silfer (kontraŭ).

Inter la aliaj kontribuintoj, nur kunpragano J. Karen tute defendas la eldirojn de Urbanová. Laŭ li, necesas "pli alten grimpi" kaj pliampleksigi vortarojn. Forte kontraŭstaras la pragan tezon H. Mayer, N. Rossi, B. Golden, R. Rossetti, C. Piron kaj R. Dumain. Iom pli

milde kontraŭstaraj estas J. Martelmonto kaj G. Waringhien (ĉi lasta kontribuas nerekte per alicela intervjuo). P. Martinelli rolas prezidantece kaj starpunktas iom senpartie.

Sendube ĉiu leganto venos al ĉi libro kun sia propra sinteno pri la afero—ĉu forte emocia aŭ ne. La mia ne estas fiksita kaj iom ŝanceliĝadas. La diversaj artikoloj ĉiuj havas detalojn apogajn al la propraj sintenoj, kaj en la fluo de legado ĉiu aparte povas esti iomgrade konvinka. Mi konsentas kun R. Dumain, ke se temas pri *neceso* de iu neologismo, tio baziĝu sur nuanca aŭ alia semantika bezono (kiel ekzemple ĉe etnaj manĝaĵoj).

Iu kerna demando ĉi tie estas, ĉu oni apartigu la beletran lingvon de la ĉiutaga kaj la teknika. Por limigi la diskuton, oni devas unue allasi tiun dividon. La problemoj pri neologismoj en la teknika lingvo estu alia diskuto.

En la propra etna lingvo, homo renkontas de tempo al tempo neologismojn en la beletro, kaj en la poezio kaj en la prozo. Artista licenco donas rajton eksperimenti ĉiel ajn, ĉu ne? Kaj la praganoj argumentas ne nur por neologismoj precizigaj, sed por tiuj nur redunde kaj alternative sinonimaj, cele al pliriĉigo de la lingvo. Iu aserto estas, ke tio necesas por iam finfine montri al la mondo, ke Esperanto pretas por ĝia akcepto.

Tamen ĉe Esperanto, kaj iomgrade ĉe aliaj lingvoj, trafa estas lerta uzo de kunmetoj bazitaj sur la latentoj en tiu lingvo. La kontraŭpraganoj kaj aliaj skemismuloj fojfoje asertas, ke tiuj kiuj trouzas neologismojn ne sufiĉe regas la lingvon, malkapablas eltiri ties latentojn. Aliflanke, naturalismuloj (tre ofte latinidistoj) ĝojas elmontri ekzemplojn de mallertaj, aĉritmaj kunmetoj skemisme uzataj, cele al pruvo, ke kunmetumado estas nur primitiva etapo de la lingvo.

Mi proponu la jenan: ke ĉiu pragano aŭ alia naturalismulo montru kune kun sia neologismumado ankaŭ la propran kapablon uzadi la lingvajn latentojn. Alie oni povus suspekti, ĝuste aŭ ne, efektive neregipovon.

Jen libro mallonga sed enhavoplena, kapabla stimuli kaj la cerbumadon kaj la praktikadon. Mi senrezerve rekomendas ĝin al tiuj, kiuj okupiĝas pri stilistikaj kaj aliaj lingvaj demandoj.

R. Jaderstrom



VOLAS KORESPONDI

Amikeco trans limoj

Noto: Nomojn kaj adresojn ni prezentas dikliteraj; familiaj kaj urbaj nomoj estas MAJUSKLAJ. Komojn ni uzas por montri ŝanĝon inter linioj en adreso.

BULGARIO

Katia BELCHEVA, PLOVDIV 4002, ul. "Zvezda" no. 53. 17-jara lemantino en ekonomia faklernejo, ŝatas muzikon, dancadon, kinon, literaturon, ludas gitaron kaj verkas poeziaĵojn.

D-ro Ing. Ĥristo MANDEV, bulv. Mogilev N-ro 2. II. 19, 5306 GABROVO. 54-jara inĝenier-kemiko, interesiĝas pri turismo, muziko, foto- kaj kino-arto, veturado, ĥorkantado ktp, kolektas neuzitajn kaj neŝtampitajn pm en kompletaj serioj, ilustritajn bk, monerojn, krajonojn, insignojn, ktp.

ĈEĤOSLOVAKIO

Jindra OPRSAĻ, CS-788 11 LOUCNA NID, c.p. 74. 27-jara antaŭa arbargardisto, nun rulseĝulo, pri ĉiuj temoj, interŝanĝos esperantaĵojn.

Ota PAVLICEK, Dreyerova 639, 152 00 PRAHA 5. 42-jara ŝoforo de aŭtobuso, amatora fotografisto, interesiĝas pri vivo en diversaj landoj kaj nigra-blanka fotografado.

ĈINIO

Ju YANG, Shiwei-Zuzhibu, CN-436400 WUXUE, Hubei. 31-jara oficisto, ŝatas turismon.

GANAO

AZOMBAKIN Kwame, P.O. Box 093 OSU, ACCRA. 24-jara studento de internacia rilato (diplomatia kurso), ŝatas legadon, lingvojn, muzikon, videon, vojaĝojn, por perfektigi sian Esperanton.

GERMANIO

Manfred STRIEVOSKY, Bruno-Taut-Ring 65, D-O-3038 MAGDEBURG. 41-jara instruisto, pri ĉiuj temoj, kolektas pm, pk kaj vidindaĵojn el aliaj landoj.

KOREIO

CHAE Kyounghee, 108-11 Nokyang-dong, ULJUNGBU, 480-120. 20-jara studentino en universitato, fratilino, por perfektigi sian Esperanto-kapablon, interesiĝas pri Usono.

NEPALO

Pradeep MANANDHAR, Kha-2 603 Om Bahal, Ward No. 1-23, KATHMANDU. 21-jara studento de fiziko, interesiĝas pri

socia servado, sporto, naturo, kanto ktp.

POLLANDO

Mirosław ZAWADZKI, PL-80-398 GDANSK-OLIWA, str. Obr. Wyrzeza 4C/85. 22-jara studento, interesiĝas pri turismo, sporto, literaturo kaj ankaŭ danco.

Lucyna PIETRASZEK, 32-062 ZACZERNIE 141. 26-jara instruistino, interesiĝas pri problemoj de la ĉiutaga vivo, historio, politiko, turismo.

Krystyna WALC, ul. Sportowa 4/102, 35-111 RZESZOW. 30-jara bibliotekistino en pedagogia kolegio, interesiĝas pri literaturo, pentrado, tapetoj, dekorado, teatro, kino, parapsikologio, magio, amas bestojn (precipe sovaĝajn katojn), Esperante kaj angle.

Edmund GLEBOCKI, ul. XXX-Lecla 2/50, 12-100 SZCZYTNO. 43-jara teknikisto, kun usonanoj, kiuj volas interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn.

Halina-Eleanora PACWA/CWIK, P.O. Box 422, 00-950 WARSZAWA 1. Biologino, interesiĝas pri muziko, naturo, azia kulturo.

Anita KRYSZTOFIK, Zychlin 6, 63-324 KUCZKOW, woj. Kalsz. Lernantino, interesiĝas pri Esperanto, poŝtmarkoj, ŝatas legi librojn.

Teresa kaj Piotr NURKOWICZ, ul. W. Witosa 2/39, woj. Tarnow, 39-200 DEBICA. Instruistino-pedagogo kaj konstruteknikisto, geedzoj kun juna filo, volas korespondi, ankaŭ pretas reciproke gastigi.

SOVETIO

[Ni apartigas korespondetojn el Sovetio laŭ la respublikoj de kiuj ili venas. () indikas, ke la nomo venis de listo sendita de Viktor Kudrjavcev.]*

Azerbajĝano

***Tatjana LAVRENJUK, Sovhoznaja 23-3, SU-350030 BAKU.** 18-jara virino, interesiĝas pri muziko, diskoj.

Kirgizio

***Anna KORNIENKO, Gogola 3-16, SU-720021 FRUNZE.** 15-jara virino, interesiĝas pri libroj, bestoj, korespondado.

Rusio

KOTELNIKOV Ivan, SU-167026 SYKTYVKAR-26, str. Mira 10-56. 10-jara knabo, pri religio.

Trofilm ATOŝENKO, SU-660017 KRASNOJARSK, ul. Dubrovinskogo 106-163. 12-jara knabo.

Maksim FJODOROV, p/k 20703, SU-

660017 KRASNOJARSK. 13-jara lernanto, interesiĝas pri sporto, kolektas pm, bk, monerojn, monbiletojn.

***Mihail KAZAKOV, Puškina 13-51, SU-614000 PERMJ.** 14-jara viro, interesiĝas pri nekonataj flugobjektoj.

***Dmitrij IVANIŜEV, 2 pr. Stroitelj 4-6-24, SU-347340 VOLGODONSK.** 15-jara viro, interesiĝas pri ĉiuj temoj.

SAECKAJA Lidija, SU-167029 SYKTYVKAR-29, str. Traktovaja 17, Komi SSR. 15-jara knabino, pri ĉiuj temoj.

STRUKOVA Natalia, SU-167029 SYKTYVKAR-29, Klubnij per. 1-117, Komi SSR. 15-jara knabino, pri ĉiuj temoj.

***Petr BRAJŅIKOV, Stepana Razina 85-21, SU-618120 OSA, Permskaja obl.** 16-jara viro, interesiĝas pri korespondado, libroj, sporto.

***Aleksandr DANNEKER, Isakova 157-54, SU-656050 BARNAUL.** 16-jara viro, interesiĝas pri poŝtmarkoj, libroj.

***Eŭgenija KORKEŜKO, Kamiŝlova 2-18, SU-184631 DALNIE ZELENCY, Murmanskaja obl.** 16-jara virino, interesiĝas pri ĉiuj temoj.

***Dmitrij KRASSA, Ordjonikidze 4-13, SU-355008 STAVROPOL.** 16-jara viro, interesiĝas pri ŝako, libroj, ĉiuj temoj.

***Oleg SAFRAJ, Sojuza Respublik 2-44, ZARINSK, Altaj.** 17-jara viro, interesiĝas pri gimnastiko, fremdaj lingvoj.

VEREŜINSKIJ Andreo, SU-109548 MOSKVO-548, str. Polbina 16-104. 18-jara studento en moskva kuirarta teknika lernejo, ŝatas muzikon, florojn, turismon, kortbirdarojn, legi librojn.

***Svetlana PTICUJNA, Jakira 7-108, SU-324074 KRIVOJ ROG.** 19-jara virino, interesiĝas pri poŝtmarkoj, sporto, kalendaretoj.

SIDOROV Anatolij, SU-167031 SYKTYVKAR, str. Nevelskaja 53-6, Komi SSR. 28-jara laboristo, pri kulturo, historio, arkeologio kaj etnografio de nordamerikaj indianoj.

Natalija TANOVA, ul. Lesnaja 1-58, SU-354054 SOĈI. 29-jara inĝenierino mekanika.

OSTANIN Aleksej, SU-167026 SYKTYVKAR-26, a/k 1069, Komi SSR. 35-jara laboristo, tutmonde pri ĉiuj temoj.

TAZIJEVA Faina, SU-167026 SYKTYVKAR-26, str. Mira 45-56, Komi SSR. 35-jara inĝenierino, pri instruado de Esperanto, literaturo, kuirarto k.a.

JAKOVLEVA Zoja P., SU-660122 KRASNOJARSK, Kutuzova 76-31. Komputistino, interesiĝas pri psiĥologio, turismo, mastrumado, dancado, lingvoj, flutmuziko, interŝanĝoj.

LAZARENKO Olje, P. Vinogradova 121-A-42, SU-163001 ARKHANGELSK. Infankuracisto, interesiĝas pri psikologio, edukado, pedagogio, ŝatas vojaĝi.

LINGVAJN AFEROJN, DENOVE

de Ionel Onet

[S-ano Ionel Onet, laboranto en la Centra Oficejo de ELNA, post dujara foresto lastatempe reiris fericele al la nova Rumanio. Jen kelkaj liaj komentoj pri liaj lingvaj spertoj, enklude tiujn rilate Esperanton.]

Jam en l' aviadilo, kiu portis min de San Francisco al Frankfurt/Main, mi eniris la eŭropan etoson: apud mi sidis maljuna nederlandano, kiu plezure estis babilunta kun mi, sed lia angla sufiĉis nur por informiĝi pri necesejo kaj restoracio, dum mia germana ne estas nederlanda ĉiukaze. En la grandega flughaveno de Frankfurt/Main mi vidis ĉiuspecajn homojn, kiuj babiladis centojn da lingvoj. Aviadiloj flugis ĉien kaj revenis de ĉie. En la plej diversajn lokojn, el la plej diversaj lokoj, kun same diversaj lingvoj. Sed la anoncoj estis faritaj en nur kelkaj lingvoj, tiel nomate internaciaj. Mi eĉ demandis min, ĉu tiu ĉefo, kiu malfruis, komprenis la anoncojn al li adresitajn en la angla far voĉo kun forta germana akcento.

Ankaŭ la flugo de Frankfurt/Main al Zagreb ne estis pli agrabila: la kroato apud mi scipovis nur kelkajn esprimojn kaj izolitajn vortojn en la germana, kaj ili elĉerpiĝis dum kelkaj minutoj. Dum pli ol unu horo, ni rigardis silente trans la fenestron. Mia tuta restado en Zagreb estis preskaŭ senproblema: zorgis pri ĝi lokaj geesperantistoj. Tie, mi informiĝis, ke ĵus malfermiĝis nova DUTI FREE SHOP.¹ Tio neniel tuŝis min. Malagrable estis la fakto, ke mi tute ne kapablis komuniki kun la ekstreme afablaj pasportkontrolistoj ĉe la zagreba flughaveno. Loka samideano servis kiel interpretisto, kaj dum ŝi penis traduki, mi kaj la deĵoranta ulo povis nur interŝanĝi ridetojn.

En la fervoja stacidomo de Zagreb, la juna biletvendisto demandis min: *Are you a smoking?*, celante informiĝi, ĉu mi estas fumanto. Dum vizito en DUTI FREE SHOP en Zagreb oni alparolis min kroate kaj mi respondis anglalingve, ke mi ne komprenas. La sekvanta vorto de la vendisto estis *Kako?* (Kio?), kaj mia sekvanta movo estis eliri la vendejon kun angla nomo, kaj en kiu la angla estas nekonata lingvo.

En Timișoara, miaj valizoj kun etiketoj de Lufthansa altiris rigardojn kaj ĉiuspecajn ulojn dezirantaj alparoli min. En almenaŭ dek lingvoj oni demandis min, ĉu mi parolas la kernajn lingvojn. Mi respondis ĉiam rumane, kaj sekve ne scias, ĉu la lingvaj konoj de tiuj nefidindaj uloj superis la demandon "Ĉu vi parolas tiulingve?"

En la trajno Timișoara—Beograd babilema sviso celis interparoli kun bela rumanino. Kvankam li scipovis la germanan, francan kaj italan, la babilado ne povis okazi ĉar ŝi parolis nur rumane, ruse kaj angle. Eĉ pere de ses

lingvoj du homoj ne kapablis komuniki inter si!²

Miaj gepatroj rakontis al mi pri la vizito, kiun miaj francaj amikoj faris (bedaŭrinde sen mi) ĉe ili. Mia kuzino servis kiel interpretisto, sed la dialogoj estis "sterilaj kaj neinteresaj" pro la fakto ke la nivelo de la uzata lingvo ne estis sufiĉe alta. Kia bedaŭro, ĉar ĉiuj havis tion por diri!

La ŝakasocio en Tulcea eldonas kvarlingvan bultenon. Krom la rumanlingvaj tekstoj, ĉiuj aliaj estis erarozaj, almenaŭ en la numero, kiun mi trafis. Kaj el ili nur la Esperantan mi sukcesis kompreni, kvankam ankaŭ ĝi ne estis senerara. Dum la Asocio de Esperanto Cluj ne sukcesas akiri paperon por la planita bulteno, aliaj misuzas ĝin por aperigi tekstojn en nekompreneblaj lingvoj. Kia bedaŭro! Pensigas la aserto de ĉefredaktoro de semajna gazeto en Cluj: mi plezure eldonus alilingvajn versiojn de nia gazeto, sed en kiu lingvo por trafi plej multe da legantoj? Kvankam mi tion pensis, mi ne elbuŝigis la vorton *esperanto*.

Mi ne povis servi kiel misisto en lando, kie la E-agado—spite plurajn malfacilaĵojn—disvolvigas laŭ nekredeblaj vojoj. Mi certas ke eĉ la pupeca estraro de la Rumana Esperanto-Asocio ne scias kiom da kursoj ĉiunivelaj okazas ĉie tra Rumanio. Dum du semajnoj, mi ne sukcesis informiĝi kiom da radiaj kaj televidaj stacioj dissendas E-kursojn kaj programojn. La bunta gazetaro aperigas pli da E-rubrikoj kaj materialoj ol la usona gazetaro pri la Orienta Eŭropo. Certe, la tuta movado suferas. Ĝi suferas pro manko de organizado, pro abundo de egoismaj sintenoj, pro manko de materialoj diversspecaj (por intervjuiĝi por la E-redakcio de la klujaj televido kaj radio, mi mem devis kunporti la kernajn kasedojn, aĉeteblajn en Rumanio nur kontraŭ okcidenta valuto), pro ia izolita pozicio de la lando en la mondo. Kaj tamen la rumaniaj esperantistoj estas esperplenaj. La fakto ke sindonemaj samideanoj el diversaj landoj (precipe el Eŭropo) vizitis ilin, kutime portante kelkajn utilajn materialojn, esperigas niajn samideanojn en Rumanio. Kaj, kiel asertas malnova esperantisto, "se oni ne entute neglektas nin, ni vivos."

¹ Tiel. S-ano Onet donis al mi presitan informilon, kiu surportas la vortojn DUTI FREE SHOP (la ceteraj informoj estas en la kroata lingvo).—red.

² Vidu ankaŭ la anekdoton "D-ro Fiŝer rakontas" de Vilho Setälä, en Friis, L.: *Rakontu samideano*, Aabyhøj: Dansk Esperanto Forlag, 1966, pp. 52-53. La Fiŝer-anekdoto devenas de antaŭ la Unua Mondmilito. *Plus ça change...*—red.

Local Contacts

[* = Issues a regular or occasional bulletin or newsletter. + = Participates in information-requestor exchange program with ELNA.]

- +Arizona: Wm. Shanks, E-o Soc. of AZ, 1345 W. Escarpa, Mesa, AZ 85201
- +California: E-o Assn. of Los Angeles, 1112-7th St. #811, Santa Monica, CA 90403
- *+California: E-o-Klubo de San Diego, Box 288012, San Diego, CA 92128-0991, (619) 528-0880
- California: Inland Empire E-o Group, 22797 Barton Rd. #117, Grand Terrace, CA 92324, (714) 689-5576 or (619) 949-1958
- +California: Orange Co. E-o Assn., Box 1538, Garden Grove, CA 92642
- *California: E-o Soc. of Ventura County, 5968 Joshua Trail, Camarillo, CA 93012-4478
- +California: Santa Barbara E-o Soc., 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111
- *+California: San Francisco E-o Regional Organization, 410 Darrell Rd., Hillsborough, CA 94010, (415) 342-1796
- *+California: Ligo de Orient-Golfaj E-istoj, Box 324, Berkeley, CA 94701-0324, (415) 770-1452
- *+California: E-o Group, 440 Bret Harte Rd., Sacramento, CA 95864
- Colorado: Denver E-o Group, 995 Humbolt #205, Denver, CO 80218
- Colorado: Western Colorado Esperanto Center, c/o Martha Evans, 342 Hill Ave, Grand Junction, CO 81501, tel. (303) 242-0650
- *+District of Columbia: Washington E-o Soc., 4406 - 35th St. NW, Washington, DC 20008, (202) 363-6197
- Florida: Florida E-o Soc., 3988 Sabal Drive, Oviedo, FL 32765
- +Idaho: David Baron, Box 37, Eagle, ID 83616
- +Illinois: Chicago E-o Soc., 5048 N. Marine Dr. #D-6, Chicago, IL 60649
- Indiana: E-o-Klubo de Indiana, p/a William Rieske, 1109 E. First St., Greenfield, IN 46140, (317) 462-1504
- +Maryland: Baltimore E-o Club, T. Goodman, 3218 Shelburne Rd., Baltimore, MD 21208
- *+Michigan: E-o Soc. of Michigan, PO Box 3011, Southfield, MI 48037, (313) 646-2965
- +Michigan: Soc. of E-o Language Friends, c/o James F. Hillaker, 6191 Finch Lane, Flint, MI 48506, (313) 736-7652
- +Michigan: E-o Club of Kalamazoo, 224 Rose Pl., Kalamazoo, MI 49001
- Michigan: Cereal City Esperanto Friends, p/a Michael Larkin, 3904 Beadle Lake Dr., Battle Creek, MI 49017
- +Minnesota: E-o Club of Minneapolis, 1528 Laurel Ave. #3, St. Paul, MN 55104
- *+Missouri: E-o-Asocio de Sankta-Luiso, P.O. Box 69144, St. Louis, MO 63169-0144
- +Montana: Montana E-o Soc., 330 Lindley Pl., Bozeman, MT 59715
- *+Nebraska: Nebraska Internacia-lingva Asocio, R.F.D. 1 Box 29, Wilber, NE 68465, (402) 821-2027
- +Nevada: Nevada Inform-Centro pri E-o, POB 50113, Reno, NV 89513, (702)746-0204
- *+New York: NYC E-o Soc., c/o Thomas M. Eccardt, 455 E. 14th St., #3C, New York, NY 10009
- New York: UN Office of UEA, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017
- North Carolina: E-o Society of the Triangle, 5400 Belsay Drive, Raleigh, NC 27612
- +Ohio: E-o Assn. of Ohio, 1144 Kingsdale Terr., Columbus, OH 43220
- *+Oregon: Portland E-o Soc., 11905 SW Settler Way, Beaverton, OR 97005
- +Pennsylvania: E-o Society of Philadelphia, 26 E. Rounfolt Rd., Philadelphia, PA 19119, (215) 248-0493
- +Puerto Rico: E-o Society of Puerto Rico, Dr. Tomas Sarramia, Box 22916 U. of Puerto Rico, San Juan, PR 00931
- Texas: E-o Study Group, P.O. Box 1446, Houston, TX 77251-1446, tel. (713) 522-7499, (713) 666-7509
- +Texas: Rio Grande Valley E-istaro, Prenda Cook, Box 7167, Harlingen, TX 78550, (512) 423-3056
- +Utah: E-o Club, Box 21346, Salt Lake City, UT 84121
- +Washington: Seattle E-o Soc., 6002 NE 61st St., Seattle, WA 98115
- Wisconsin: E-o Society of Wisconsin, 1958 N. 38th St., Milwaukee, WI 53208
- *Regional (Rocky Mountain States): Intermountain E-o Group (AZ, CO, ID, MT, NM, UT, WY), p/a Charles Tustin, P.O. Box 112, Coram, MT 59913
- *+Regional (Tidewater): E-o Society of the Carolinas and Virginia, Route 5 Box 303, Boone, NC 28607, (704) 264-2297
- *+Regional (New England): E-o Soc. of New England, P.O. Box 655, Concord, MA 01742, (508) 264-4349
- Special Interest: E-o-Language Toastmasters Club, P.O. Box 60860, Sacramento, CA 95860, (916) 485-3116

VOJAGU ESPERANTE 1991

• Esperanto Classes—July 1-19
San Francisco State University
"The best in the world!"

• E.L.N.A. Annual Convention
Raleigh-Durham, North Carolina
July 20-25

(Although the Interkona Vespero does not take place until Saturday evening the 20th, it's a good idea if possible to arrive Friday night because the L.K.K. is providing a full program of optional Esperanto programs during the day on Saturday. If you can arrive on the 19th, you won't have to miss any of them.)

AIR FARE IS EXPENSIVE THIS YEAR. BE SURE TO CONTACT ESPERANTO VOJAG-SERVO FOR DISCOUNTS ON THE AIR FARES TO RALEIGH-DURHAM AND BERGEN.

• 76a UNIVERSALA KONGRESO
Bergen, Norway
27 July—3 August

• POST-KONGRESA EKSKURSO
3-12 aŭgusto

RESERVE OUR ESPERANTO VIDEO-TAPE ABOUT BERGEN. IT'S GREAT FOR MEETINGS AND CLASSES!

Lusi Harmon
Esperanto Vojag-Servo
6104 La Salle Ave.
Oakland, CA 94611
(415) 339-2001

Is it safe to travel this year?

As a professional in the travel business, I would not recommend traveling to the middle east this summer, but many destinations including Scandinavia are probably safer than staying home. It's certainly safer than driving on the California freeways! We have never seen more care taken to ensure the safety of travelers. It takes a lot longer to get checked in; you cannot check your bags at the curb; and there are a lot more questions about who packed your suitcase, who has had access to it, and what you have in it. We will certainly be traveling to Bergen this year, and we hope you will be able to join us!

Bergen is an ideal city for a convention. It is large enough to be interesting, but small enough to be easily managed. It is both "Norwegian" and international! It is also situated in one of the most beautiful areas in the world, has a delightfully mild summer climate, and is the gateway to fjordland. The convention program will be very interesting including beautiful concerts and theatricals in the comfortable and modern Grieg Hall.

EVS has reserved an affordable hotel in the center of town, about as close as you can get to the kongresoj, and we have reserved space on SAS Airlines with guaranteed fares back to the beginning of the fall season for the dates of the convention. This will prove to be a great savings for those of us lucky enough to go to Bergen!

POST-KONGRESA EKSKURSO CRUISE FROM BERGEN: 3 Aug.

- To the North Cape
- To Lapland
- To the Land of the Midnight Sun
- Fly back to Oslo for 2 days before flying home: 12 August

The MS Lofoten can take you on a voyage along the most beautiful coastline in the world. To many people, crossing the Arctic Circle is an unforgettable experience. But it is when the mountain wall of the Lofoten Islands rises from the sea that words fail completely. The ship is an attraction in itself—a floating hotel, always on the way to new sights, new experiences, new adventures. You will enjoy service and meals you could expect in a first-class hotel. Yet the Coastal Express ships are not cruise liners. They are a means of communication for the local people; they carry goods to supply the needs of the coastal communities—and they are part of Norway's maritime culture!

The atmosphere on board is informal and relaxed. Scenes continually change, but slowly enough to allow you to absorb them; and to feel at one with the life of the coast and the mighty scenery that surrounds you.

**CRUISE WITH FELLOW ESPERANTISTS
ENJOY NORWAY AT ITS BEST**
Space is limited—sign up today!



ELNA

President: Angela Harlow (1993), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564, tel. (415) 222-0187
Vice President: Dr. Grant Goodall (1993)
Secretary: Virginia Stewart (1992)
Treasurer: John B. Massey (1991)
Other Board Members: Ellen Eddy (1991), Nels M. Nelson (1991), William H. Schulze (1991), Prenda Cook (1992), Frank Helmuth (1992), Dr. Jonathan Pool (1992), Dr. E. James Lieberman (1993), Sherry Wells (1993), David Wolff (1993)
Commissioners: Jim Deer (Tape Service), Joan Gildemeister (Legislative Affairs), Lucy Harmon (Travel Affairs), William R. Harmon (Central Office), Dorothy Holland-Kaup (Correspondence Courses), R. Kent Jones (Science & Technology), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey (Wills and Gifting), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs), Ellie Stein (Women's Affairs)
Director, Central Office: Mike Donohoo
Vice-Director, Central Office: Ionel Onet
ELNA Archivist: Hal Dreyer

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1991	
Regular	\$25
Family	\$37.50
Youth (under 26)	\$12.50
65 year or above	\$15
Sustaining	\$50
Life	\$500

ELNA is a non-profit organization functioning under IRS paragraph 501(c)3. Donations are tax-deductible.

A separate supporting category, "Friend of Esperanto," has been established. A Friend of Esperanto pays \$7.50 per year.

UEA dues 1991

Member-Guidebook only (MG)	\$ 7.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$16.00
Member-Subscriber (MA)	\$39.00
Societo Zamenhof (additional)	\$78.00
Subscription only to Esperanto	\$23.00
Subscription only to Kontakto	\$12.00
Life Membership in UEA	\$975.00

Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (415) 653-0998. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1991(3) of Esperanto U.S.A. is March 25, 1991.

ELNA Newsletter
Volume 27, No. 1
ISSN 0030-5065
Esperanto League for North America, Inc.
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
Telephone: (415) 653-0998
Editor: Don Harlow